

Lazar Markoviĉ Zamenhof kaj la Zamenhof-falsaĵaro

Árpád RÁTKAI

Resumo. Lazar Markoviĉ Zamenhof (1859–1917), rusa judo naskiĝinta en la urbo Bjelostoko (Grodna gubernio, Rusio) iniciatis la Internacian Lingvon sub la plumnomo/pseŭdonimo Dr. Esperanto en la jaro 1887 en Varsovio. En la 20-a jarcento pro diversaj motivoj oni falsofaris kaj liajn nomon, plumnomojn, naskiĝlokon, etnan identecon kaj lian iniciaton. Ni detale montras la falsigojn kaj komparas ilin kun la veraĵ datumoj.

Abstract. Lazar Markovich Zamenhof (1859–1917), a Russian Jew born in Bielostok (Grodno Governorate, Russia), in 1887 initiated the International Language under the pen-name Dr. Esperanto. In the 20th century, his name, pen-names, birthplace, ethnic identity and his initiative were changed for various reasons, resulting in false information being published in many encyclopedias and other media. We exhibit these false assertions and compare them with facts.

LAZAR MARKOVIĈ ZAMENHOF (1859–1917), rusa judo naskiĝinta en la urbo Bjelostoko (Grodna gubernio, Rusio) iniciatis la Internacian Lingvon sub la plumnomo/pseŭdonimo Dr. Esperanto en la jaro 1887 en Varsovio. En la 20-a jarcento jen pro timo de antisemitoj, jen pro judofobio, jen pro rusofobio, jen pro aliaj kaŭzoj, esperantistoj falsofaris kaj liajn nomon, plumnomojn, naskiĝlokon, etnan identecon kaj lian iniciaton. Tiun komplekson de falsaĵoj poste multaj esperantistoj sincere kredis kaj fervore disvastigis kune kun la lingvo. Konforme al la Zamenhof-falsaĵaro, kiu dum jarcento esperantistoj disvastigis, multaj referenclibroj kaj aliaj fontoj enhavas diversajn falsajn datumojn. En la lastaj jardekoj tamen fariĝis por ili pli kaj pli malfacile akceptigi la tradiciajn galimatiojn; tial la komponentoj de Zamenhof-falsaĵaro faladas kiel domenludiloj. Por kompreni la aktualan situacion unue ni devas fiksi la faktojn.

1. Nomo

Aŭtenta nomo de persono estas fundamenta identigilo fiksita en oficialaj dokumentoj. La nomo estas fundamenta referencilo en tiuj kazoj, kiam la persono aplikas unu aŭ plurajn plumnomojn, aŭtornomojn, pseŭdonimojn, kaŝnomojn, karesnomojn, mallongigitajn nomojn, kromnomojn, moknomojn, ŝercnomojn, asimilitajn (tradukitajn, alilingvajn) nomformojn kaj aliajn nomvariantojn. Referencilo aparte gravas en la bibliotekaj katalogoj kaj ĝenerale en informadiko.

Samtempe (sinkrone) nur unu aŭtenta nomo ekzistas, sed sinsekve (diakrone) oni povas havi du aŭ plurajn. Nomŝanĝo povas okazi nur laŭ decido aŭ almenaŭ rekono, konfirmo de ŝtata aŭtoritato, kaj oni devas same fiksi tion en oficialaj dokumentoj, aŭ almenaŭ oni povas sendube konstati tion el aliaj oficialaj dokumentoj, kies temo ne la nomŝanĝo estas. Ekde la nomŝanĝo tiu nova estas la aŭtenta, kaj la persono por oficiala celo devas uzi ekskluzive la novan; uzo de la malnova estas falsofaro.

Rusaj nomoj konsistas el tri elementoj: person-nomo + patra nomo derivita + famili-nomo. Pri la nomo de Zamenhof ekzistas pluraj dokumentoj, kiuj aperis plurfoje kun fotokopio, traduko k.t.p. Laŭ la naskiĝatesto¹ oni registris la jidan personnomon de la novnaskito: Лейзеръ [*Lejzer'*']. Poste, en la aliaj dokumentoj, ne tiu nomo aperis, sed la antaŭnomo Лазаръ [*Lazar'*']. Lia dua nomo derivita el la nomo de la patro ne aperis en la naskiĝdokumento. En unu dokumento tiun duan nomon oni derivis el la jida nomo de lia patro: Мотелев [*Motelev*'], kaj en alia dokumento la patran nomo aperis ruse kaj en gramprojoj jide: сын Марка (Мотеля) [*filo de Marko (de Motel)*']. En ĉiuj aliaj dokumentoj tiu patra nomo estas Маркович [*Markoviĉ*'].

En la dokumentoj kompreneble oni skribis lian nomon en la oficiala, rusa lingvo, per ciril-litera alfabeto: Лазаръ Маркович Заменгофъ [*Lazar' Markoviĉ Zamenhof''*'].² Lian nomon atestas la jenaj oficialaj dokumentoj:

1. Atesto pri lia sano, 1869.³
2. Peticio de Zamenhof al la Moskva Universitato, 1879.⁴
3. Atesto pri tio, ke li estas filo de Marko Fabianoviĉ Zamenhof, 1879.⁵
4. Peticio de Zamenhof al Moskva Universitato, 1879, alskribo 1880.⁶
5. Atesto de la Moskva Universitato al Zamenhof pri eksigo, 1881.⁷

¹Esperanto Triumfonta nr. 115, 1922-12-17; Lapenna 1960:[105, fotopaĝo 1]; Boulton 1962:[fotopaĝo 3]; Holzhaus 1973:8, 68. 1978:10, 71; Holzhaus 1978:10, 71.

²La cirila r [g] respondas kaj al la latina g, kaj al la latina h. La elekto de h en tiu ĉi kazo estas motivita de la ĝermana (germana aŭ jida) origino de la nomo.

³La Nova Epoko, Nr. 75, Dec. 1929:60; Holzhaus 1973:8, 68.

⁴La Nova Epoko, Nr. 75, Dec. 1929:62; Holzhaus 1973:10, 71.

⁵Holzhaus 1973:9. En tiu atesto aperis la patra nomo Motelev.

⁶La Nova Epoko. Nr. 75. Dec. 1929:60; Holzhaus 1973:10-11, 71.

⁷La Nova Epoko. Nr. 75. Dec. 1929:64, 65; Holzhaus 1973:12.

6. Atesto de Moskva Universitato pri li al la Varsovia Militadministrejo, 1881.⁸
7. Diplomo por li de Varsovia Universitato, 1885.⁹
8. Parto de petskribo: Programo por la periodaĵo *La Internaciulo*, 1888.¹⁰
9. Aldono al la petskribo por eldono de periodaĵo, 1888.¹¹
10. Naskiĝdokumento de lia filino Sofia Lazarovna Zamenhof, 1889.¹²

Kvankam en la naskiĝdokumento la nomo de la infano kaj de la patro aperis jide, poste la instancoj neniam kreis pluan dokumenton por deklari la rusaĵn formojn, nur simple uzis ilin. Do se temas speciale pri la suĉinfano Lejzer, aŭ pri la infano iom poste, la uzo de tiu nomo estas ĝusta, kondiĉe ke restas klare, ke temas pri la frua, jida antaŭnomo de Lazar Markoviĉ Zamenhof.

Krom tiu oficiale akceptita ŝanĝo de *Lejzer*" al *Lazar*' aliaj ŝanĝoj ne okazis. En la postaj vivperiodoj lia nomo estis *Lazar Markoviĉ Zamenhof* ĝis la fino de lia vivo. Unu el la dokumentoj estis publikigita en 1923, kvar aliaj en 1929. El ili ĉio evidentiĝis, kaj la poste publikigitaj pluaĵ dokumentoj alportis nenion novan. La dokumentoj estas aŭtentaj; almenaŭ dum la pasintaj okdek jaroj ne aperis dubo pri ilia fidindeco.

Oni povas paroli ankaŭ pri oficiala nomo, sed tiukaze atenti, ke la vorto "oficiala" signifas "laŭ la preskriboj de la rusa ŝtato", kaj ne "laŭ la religiaj preskriboj". Manko de tiu distingo ebligas konfuzon kaj misprezenton, kiel en kelkaj Zamenhof-biografioj (speciale ĉe Maimon 1978).

Kvankam nur unu fojon, en 1889, li skribis poŝtkarte:¹³ "Mia plena nomo estas Ludvigo Lazaro (Ljudovik Markoviĉ Z-f)"¹⁴ Estas rimarkinde, ke la esperantaj kaj la rusaj nomoj ne kongruas. Ĝi estas privata mesaĝo, el kiu oni povas konkludi kiel li tiutempe volis esti konata de ruslanda esperantisto. Post tiu sola kazo nek kiel nomo, nek kiel plumnomo ĝi aperis. Li elektis aliajn plumnomojn. Tiu citaĵo certe estas taŭga por analizi la psikon de LMZ kaj lian rilaton al sia patro, sed ne por konstati lian nomon antaŭ ekzameni la dokumentojn.

⁸Holzhaus 1973:11, 72.

⁹Holzhaus 1969:297; 1973:13, 14, 48, 49, 77, 485. – Лазарь сын Марка (Мотеля) (1969:297, 1973:13, 48, 485) [*Lazar' filo de Marko (de Motel)*] (1969:313, 1973:14, 49).

¹⁰Holzhaus 1969:294, 295, 310, 311; 1973:47, 49, 482, 483.

¹¹Holzhaus 1969:296; 1973:49, 484. – La nomoj ne estas tradukendaj, sed Holzhaus donis Esperantan formon ankaŭ al la patra nomo ("de Motel", 1973:49). En la originala teksto estas "Мотелев" [*Motelev*] (1969:296, 1973:484).

¹²Holzhaus 1969:145, 476; 1978:19, 157.

¹³Poŝtkarto 1889-06-21/1889-07-03 al Vladimir Majnov; citita laŭ Zamenhof (1929:482).

¹⁴"*ruslitere*", t.e. verŝajne Людовикъ Марковичъ З-фъ, kvankam la fonto ne uzas cirilajn literojn.

2. Nomo mallongigita

En la rusa lingvo plej ofte oni uzas nur la unuan antaŭnomon kun la familia nomo, kaj la duan nom-elementon oni simple ellasas, ofte ankaŭ en oficiala uzo. Krome la duan aŭ la unuajn du nom-elementojn ofte oni mallongigas per la komencliteroj. Plej ofte restas nur la komenclitero de la unua nomelemento. Do lia nomo plej ofte aperis kaj li plej ofte subskribis Л. Заменгофъ aŭ *L. Zamenhof*.

La pli longan mallongigitan formon Л. М. Заменгофъ aŭ *L. M. Zamenhof* li uzis nur en kazoj de neceso. Ekzemple en Sanktpeterburgo li dek tri foje aperigis anoncojn en la ruslingva semajna ilustrita revuo *Niva* en 1899. En tiuj anoncoj la varsoviano Дрѣ. Л. М. Заменгофъ [Dr'' L. M. Zamenhof''] ofertis siajn librojn pri Esperanto.¹⁵ Li promesis sendi libropakon al tiuj, kiuj sendas tri rublojn kaj 20 kopekojn al li. Monsendaĵojn la poŝto akceptis nur kun preciza adreso kaj poŝtistoj rajtis enmanigi ĝin nur al tiuj personoj, kies identeco estis kontrolebla per legitimilo.

Jam pli frue, en 1888, li dufoje anoncis en la sama gazeto tiel, ke li petis la monsendaĵojn al la nomo *L. Zamenhof*. Povis okazi, ke li havis malfacilaĵon pro manko de la dua nomo aŭ nom-mallongigo; tial li ŝanĝis la nomon en la pluaj anoncoj. Sed kiam temis pri simpla poŝta sendaĵo, kompreneble sufiĉis *L. Zamenhof*, kion oni povas legi sur liaj poŝtkartoj, kovertoj, stampiloj k.t.p.

En la mallongigita nomo la signifo de *M.* estis 'Markoviĉ' kaj *L.* estis 'Lazar'. La esperantigita *Lazaro Zamenhof* estis en la *Adresaro de la esperantistoj* eldonita de *L. Zamenhof*. La konstantecon de lia nomo montras ĝiaj derivaĵoj en la kompleta nomo de lia filino, kiel en la menciita dokumento de Sofia Lazarovna Zamenhof el la jaro 1889 kaj ŝia kuracista diplomo el la jaro 1915.¹⁶

En la jaroj 1887–1889 li aplikis la plumnomon Dr. Esperanto, sed de 1889 dum dek ses jaroj aperis liaj verkoj sub la mallongigita nomformo *L. Zamenhof* aŭ *Dr. L. Zamenhof*. En la plej longa periodo de lia aŭtora aktivaĵo li verkis preskaŭ ĉiam sub sia mallongigita nomo. La eldonejo Hachette enkondukis ankaŭ aliajn plumnomojn, sed tio apartenas al la historio de liaj plumnomoj. En la lasta periodo de sia vivo li uzis *L. Zamenhof* kiam temis pri mono.¹⁷ En aliaj kazoj li subskribis jen tion, jen iun el la plumnomoj.

¹⁵Holzhaus 1969:80–86; 1973:28, 308–312.

¹⁶Holzhaus 1973:56, 498.

¹⁷En 1911, en la nomaro de klientaro de Ĉekbanko Esperantista. Holzhaus 1973:58, 516.

3. Plumnomoj

La aŭtoro LMZ simile al multaj aliaj aŭtoroj aplikis plurajn plumnomojn. Komence li preferis pseŭdonimojn, poste li aplikis sian familian nomon kun diversaj plum-antaŭnomoj. Sed en ĉiuj periodoj apud la diversaj plumnomoj li verkis ankaŭ sub la nomo *L. Zamenhof*. Ne kalkulante la postzamenhofajn falsaĵojn tiu *L. Zamenhof* estas lia plej ofta aŭtoronomo.

3.1. Plumnomoj – pseŭdonimoj

1. *Hamzefon* (1882) verkis du artikolojn en la ruslingva gazeto *Razsvet*.
2. *Hemza* (1888) tradukis *Kanto de studentoj* en la *Dua Libro*.
3. *Dr. Esperanto* (1887–1890). 1887: ruse, pole, france, germane; 1889: angle, svede, latve; 1890: bulgare. En la unuaj jaroj tiu pseŭdonimo fariĝis vaste konata.
4. *D-ro Esperanto* (1888–1890): 1888 Esperante, 1890 litove. En Esperantujo tiu pseŭdonimo fariĝis vaste konata, kaj por la unuaj esperantistoj baldaŭ evidentiĝis lia vera nomo, ja sur la lasta presita paĝo de la *Unua Libro* estis lia poŝta adreso ĉe D-ro L. Zamenhof.
5. *Amiko* (1889). Esperante en la septembra numero de *La Esperantisto*.
6. *N. N.* (1889) tradukis al la rusa sian verkon *Dua Libro de l’Lingvo Internacia*.
7. *Anna R.* (1889) tradukis Andersen en *La Esperantisto*.
8. *Hanez* (1900): studo en la hebrea.
9. *Unuel* (1903) en *Fundamenta krestomatio*.
10. *Homo sum* (1901): aŭtoro de libro pri la hilelismo.
11. *Homarano* (1906) en *Ruslanda Esperantisto*, Majo.
12. *Dr. X* (1909). Jidlingva artikolo en *Lebn un Visnŝaft*, Nr. 1.

3.2. Plumnomoj – La familia nomo Zamenhof kun diversaj plum-antaŭnomoj

1. *Do* (1903–1917). La eldonejo Hachette planis bele ornamitan paĝkapon kun la nomo de la libroserio *Kolekto Esperanta aprobita de Do Zamenhof*. En tiu serio aperis ĉiuj gravaj verkoj pri kaj en la Lingvo Internacia. En 1906 la eldonejo ŝanĝis la titolon de la serio al *Esperanto. Verkaro de Do Zamenhof*. Tamen iom pli malsupre, sub la paĝokapo neniam aperis tiu *Do*, sed kutime la vera nomo *L. Zamenhof*, kaj post 1905 plej ofte iu plumnomo.

2. *L.-L.* aŭ *Dr. L.-L.* (1903–1907): la eldonejo Hachette enkondukis tiujn plum-antaŭnomojn kun strekoj: *L.-L.* aŭ *Dr. L.-L.* Ĝia aplikado daŭris nur kelkajn jarojn, malkonsekvence, eĉ konfuze. Ofte sur la kovrilo estis *L.-L.*, sed sur la unua paĝo *L. L.*, kaj alian fojon inverse. La malkonsekvencan uzadon de la streko sekvis ĝia definitiva forlaso. Sed ankaŭ en tiuj jaroj li ofte uzis sian nomon *L. Zamenhof*.
3. *L. L.* aŭ *Dr. L. L.* (1903–1917): ĝis 1905 novaj verkoj de Zamenhof aperis jen sub lia nomo *L. Zamenhof*, jen sub la plumnomo *L. L. Zamenhof*. Ekde 1906 tiu lasta estis la plej ofte aplikata, kaj tio aperis kiel konstanta kunlaboranto en *La Revuo* en 1906, kaj aŭtoro de angla artikolo en 1907.¹⁸ La aplikadon de tiu plumnomo verŝajne iniciatis la fakuloj de la eldonejo Hachette. Pli malfrue Zamenhof mendis novan stampilon (1909) kun la surskribo *L. L. Zamenhof* kaj ofte ankaŭ subskribis tiel (1910), sed neniam ekskluzive. Paralele li ankaŭ poste uzis siajn malnovajn stampilojn kaj subskribis plej ofte *L. Zamenhof*.
4. *Lazaro Ludoviko* estis sporade aperintaj plum-antaŭnomoj. Unue ĝi aperis en 1896 en traduko de Zamenhof-letero, kies ruslingvan originalon ni ne konas,¹⁹ sed pli frue kaj poste ĝis 1906 en la sama revuo aperis ĉiam *L. Zamenhof*. En 1904 tiuj du plum-antaŭnomoj aperis sub anglalingva artikolo.²⁰ Ankaŭ en 1907 nur unu foje aperis tiuj en *La Revuo*. Stampilo *Lazaro Ludoviko* ne estas konata.
5. *Dr. Luiz* (1892) aperis unufoje, en portugala traduko.²¹
6. *Dr. Ludwik* (1910) aperis Esperante kaj pole, i.a. kiel aŭtoro de kelkaj versoj en la volumo *Sonoj esperantaj* de Leo Belmont. Li havis ankaŭ vizitkarton kun la plumnomo *Dr. Ludwik Zamenhof*.²²

Rimarkigo 1. Necesas aldoni, ke kelkaj aliaj antaŭnomoj, kvankam ili ekzistis, ne estas en tiu listo, ĉar ili estis nek aŭtentaj, oficialaj nomoj, nek plumnomoj. Ekzemple ekzistis *Eliezer*, sed taŭga nur por religiaj celoj, kaj *Ludoviko Lazaro* por privataj uzoj. Kiel plumnomoj ili estas postzamenhofaj falsajoj.

Rimarkigo 2. En la antaŭparolo de *Leteroj de L.-L. Zamenhof* Gaston Waringhien zorgo atentigis la legantojn je la diferencoj inter la leterpaperoj

¹⁸What is Esperanto? *The North American Review*, vol. 185, nr. 606, p. 15–21; Holzhaus 1969:174–181; 1978:28, 235–241.

¹⁹La tradukon fare de Vladimir Gernet aperis en *Lingvo Internacia* (Uppsala) 1898:6–7 (jun–jul), p. 119; Zamenhof (1929:417–422). Sed tie aperis nur la teksto de la letero sen la nomo de la subskribinto.

²⁰Esperanto: a New International Language. *The Independent*, 1904-08-11, p. 326–330; Holzhaus 1969:164, 1973:24, 256; 1978:28, 227, 281.

²¹*La lingua universal "Esperanto". Methodo completo comprehendendo dois vocabularios segundo a edição allemã de Dr. Luiz Samenhof traduzido e coordenado por Jayme Heinlein Ferreira de Lisboa.* Nuremberg, 1892.

²²Holzhaus 1973:477.

stampitaj kaj presitaj: *Dr. L.* respektive *D-ro L.*, sed konfuzis ilin per la jena aserto: “Ĉe la fino mi forigis la ĝentilan formulon: Via L. L. ZAMENHOF per kiu finiĝas ĉiuj leteroj” (Waringhien 1948:XII). Oni rajtas dubi je tio – ja en la titolo de la libro estas la kunlig-streka varianto *L.-L.* Krome: se sur ĉiuj leterpaperoj estis unu *L.*, oni rajtas dubi, ke subskribe ĉiam estis *L. L.*

4. Naskiĝloko

Rusio dum la vivo de LMZ dividiĝis en 81 gubernioj. En 1791 la cara administracio por la enmigrintaj judoj asignis Judan enloĝiĝan zonan²³ en la okcidenta parto de la lando. Judoj devis loĝi en la urboj de tiu zono, kie okazis multaj kontraŭjudaj pogromoj, krome ili ne rajtis libere elekti profesion kaj oni limigis iliajn lern-eblecojn. La juda enloĝiĝa zono ĉesis nur en 1917, je la egalrajtigo de ĉiuj minoritatoj.

Tiu rusia Judujo dum la vivo de Zamenhof ampleksis 22 guberniojn. Zamenhof naskiĝis en la Grodna gubernio, en la urbo Bjelostoko, kiun oni skribis kompreneble per cirilaj literoj: Белостокъ. La Esperanta formo de tiu urbonomo la unuan fojon aperis en la revuo *Lingvo Internacia* en la jaro 1896, en letero de Zamenhof: “Mi naskiĝis en Bjelostoko, gubernio de Grodno.”²⁴

La situo de Bjelostoko krom la oficiala, jura divido estas difinebla ankaŭ laŭ geografiaj-historiaj regionoj: ĝi situis en la regiono Litvo.²⁵ Multaj poloj, litovoj kaj judoj same konsideris Litvon kiel sian patrujon. En la Rusa Imperio pro la grandaj distancoj kaj grandaj socigeografiaj diferencoj vere grandan signifon havis la regionismo kaj la samlokeco.

La rusia Bjelostoko en 1918 (sed definitive nur en 1921, laŭ la packontrakto en Rigo) fariĝis parto de la sendependiĝanta Pollando. Ĉu Bjelostoko (Белостокъ) en la longa 19-a jarcento (t.e. ĝis la unua mondmilito) kaj la postmilita Bjalistoko (Białystok) estis la samaj lokoj? Geodezie jes, t.e. la geografiaj koordinatoj identas, sed preskaŭ ĉio alia rapide ŝanĝiĝis, diferencis: politika potenco, administracio, instancoj, jursistemo, mono, ekonomio, trafiko (fervoja ŝpuro), oficiala lingvo kaj skribo (alfabeto), kulturo, oficiala religio, etna konsisto de la loĝantaro, aspekto de la urbo k.t.p. La du urbonomoj kaj prononce kaj skribe diferencas, kaj ili strikte ligiĝas al sia historia

²³Черта постоянной еврейской оседлости [Ĉerta postojannoĵ jevrejskoj osedlosti]. En Esperanto oni nomas ĝin ankaŭ *setliĝa zono*, germane *Ansiedlungsrayon*, angle *Pale of Settlement*, pole *strefa osiedlenia*.

²⁴Lingvo Internacia, 1896, p. 115.

²⁵Litvo aŭ Granda Litovio kiel geografia-kultura regiono ampleksis kelkajn guberniojn, pli malpli sur la teritorio de la hodiaŭa Litovio, Belarusio, nord-orienta Pollando kaj la regiono Kaliningrado. Do ĝi ampleksis i.a. la Grodnan gubernion.

periodo.²⁶ La PIV-aj urbonomoj *Bjelostoko* (Zamenhofa vorto) kaj *Bjalistoko* (en Pollando) precize respegulas la realon.

5. Etna identeco

Li naskiĝis en juda familio.²⁷ En la juda enloĝiĝa zono pluraj etnoj vivis diaspore, miksite. En Bjelostoko la judaro konsistis la plimulton. Gepatra lingvo de la judoj estis la jida, pri kiu tiutempe oni opiniis ke envere ne estas lingvo, nur dialekto germana.²⁸ Eĉ Zamenhof mem plurfoje nomis ĝin “judgermana dialekto”. Nur en la 20-a jarcento klariĝis, ke ĝi estas vera, memstara, aparta lingvo. La patrino de Zamenhof parolis ĝin kiel gepatran lingvon, same kiel la plimulto de la aliaj judoj, kiuj ne konis fremdajn lingvojn, kvankam ili iomete komprenis tiujn de la etne bunta medio (rusa, pola, litova, germana k.t.p.).

Do, la jida estis la unua lingvo de la Zamenhof-filoj, kiuj frekventis la jidlingvan elementan lernejon. Zamenhof mem verkis ankaŭ jide; li eĉ prilaboris jidan gramatikon. La vorto *gento* havas mitan, rasisman nuancon. LMZ uzis la Esperantan vorton *gento* (kelkfoje eĉ *raso*), sed laŭ la enhavo de liaj tekstoj tute klare oni povas konkludi, ke temis pri etno, pri la jidan lingvon parolanta juda etno vivanta en Rusio.

Zamenhof tamen havis du gepatrajn lingvojn, ĉar Mark, lia patro, celis kompletan asimiliĝon. Laŭ lia volo la rusa estis la hejma lingvo en la familio. Ruslingvaj estis la gimnazio kaj la universitato, kiujn Lazar frekventis. La efiko de la rusa kulturo estis tiel forta, ke li komencis verki ruslingvajn poemojn, celante fariĝi rusa verkisto. Tamen li devis rezigni de la kompleta asimiliĝo, ja en la universitato li spertis la socian realaĵon de la cara Rusio, ke malgraŭ siaj klopodoj, li restis “nur judo”. Sed la rusa identeco restis tiom forta, ke tiu herediĝis ankaŭ al lia filo Adamo, en kies familion la rusa restis la familia lingvo eĉ post la unua mondmilito, en la sendependa Pollando.

Do, la etna identeco de Zamenhof ne estas difinebla nur per la vorto *judo*, ja la judaro konsistas el germana, hispana, hungara, etiopa k.t.p. judaj etnoj, kun apartaj kulturaj trajtoj. Zamenhof estis ruslingva judo kun rusa kulturo, mallonge: rusa judo.²⁹

²⁶Etimologia ligo inter la vortoj *Bialystok* kaj Белостокъ ekzistas, sed temas pri du malsamaj vortoj. Nun ne pri etimologio temas, sed pri la oficialaj identigiloj, pri la oficiale registritaj nomoj, kiuj efektive, fakte ŝanĝiĝis.

²⁷Anstataŭ la vorto *judo* siatempe oni uzis la vorton *hebreo*.

²⁸Eĉ en *La Nova Plena Ilustrita Vortaro* (2002) oni povas legi tiun falsan difinon.

²⁹La ofte citita Zamenhofa difino “mi estas ruslanda hebreo” estas malaplikenda, ĉar (1) temas pri judoj – la Esperanta vorto *hebreo* signifas ilian malnovepokan lingvon; kaj (2) ruslanda ne estas etna, sed geografia difino. Elmigrantaj rusaj judoj jam ne estis ruslandaj, sed restis ruskulturaj. La infanoj de LMZ vivantaj en Pollando restis ruskulturaj, sed ne ruslandaj. Paranteze: oni vokis Zamenhofon loĝi en Parizo, do esti franclandano.

6. Kreinto kaj iniciatinto

La teorion de Juan Luis Vives (1492–1540) pri la Universala Lingvo rifuzis la humanisto Comenius (Jan Amos Komenský 1592–1670), kiu lanĉis la teorion pri la Internacia Lingvo en 1668. Tiu estis parto de grandioza plano pri paco kaj kunlaboro inter la eŭropaj popoloj, kiuj gardos siajn etnajn lingvojn, en kiuj devos okazi la lerneja instruado. Li starigis postulatojn por la estonta lingvo. Sed Comenius ne sukcesis prilabori tiun lingvoprojekton, nek trovi taŭgan nomon de sia nova koncepto. Pro manko de taŭga termino oni erare taksas lin adepto de Universala Lingvo – ja ĝuste li estis la unua kiu rifuzis tion.

Kvankam LMZ ne konis kaj ne povis skizi la historian tendencon de Eŭropo tiel bone kiel Comenius, ankaŭ li celis pacon kaj fratecon inter la diverslingvaj etnoj. Por tiu celo li

1. sukcese kreis la lingvoprojekton de 1887 konforme al la postulatoj starigitaj de Comenius, kvankam li verŝajne ne konis la verkon de sia spirita antaŭulo; kaj
2. trovis la taŭgan nomon *Internacia Lingvo*, kvankam komence ankaŭ li uzis la malnovan kaj maltaŭgan terminologion: la nomo de la unua, ne publikigita versio de lia lingvoprojekto estis *Lingve Universala*.

En 1887 la projekto de Internacia Lingvo aperis sinsekve en rusa, pola, franca kaj germana lingvoj, ĉiu libro kun la aŭtor-nomo/pseŭdonimo *Dr. Esperanto*.

7. La origino de la falsofaradoj

Tiutempe oni decidis prepari la unuan internacian kongreson de esperantistoj en Francio. En tiu etoso elstaraj francaj esperantistoj intencante protekti kaj Zamenhofon kaj la Esperanto-movadon de antisemitaj atakoj decidis prezenti lian personon al la publiko kun falsa, sed ne atakebla identeco. Pro aliaj kaŭzoj fervore apogis ilin polaj esperantistoj kaj la eldonejo Hachette, kiu eldonis verkaron de “nova” Zamenhof.

La esperantista pioniro Émile Javal, fervora franca adepto de Zamenhof, fiere informis lin, ke okaze de la Esperanto-kongreso en 1905 aperis 700 artikoloj en la gazetaro, sed nur unu el ili menciis la judecon de Zamenhof. La kaŝo de la vero nur tiel eblis, ke anstataŭ ĝi ili asertis ion alian, t.e. ili mensogis, falsofaris. Javal poste konfesis: “Ni bezonis admirindan disciplinon por kaŝi al la publiko vian originon. Pri tiu punkto akordiĝis ĉiuj amikoj de Esperanto, kaj ni devas plu kaŝi la aferon, tiel longe kiel la granda batalo ne

Liaj parencoj, kiujn li vizitis dum la Vaŝingtona kongreso, estis jam kanadaj judoj.

estas gajnita.”³⁰ Porokazan prisilenton de la etna deveno de Zamenhof en tiu situacio eble estis pravigebla, oportuna taktiko. Sed intenca falsofaro, eĉ serio de falsofaroj ne estas pravigeblaj. Krome tiu falsaĵaro baldaŭ perdis sian celon kaj memstare vivis plu, sendepende de la intenco de la falsofarantoj.

Javal kaj liaj kunuloj longe sukcesis falsofari preskaŭ perfekte. La kompleksa misinformado konsistis primare per kaŝado de la etna deveno de Zamenhof. El tio sekvis retrospektiva nom-poligo de la rusa urbo Bjelostoko, naskiĝurbo de Zamenhof, falsofaro de ĝia geografia situo, virtuala poligo de ĝia plejparte juda loĝantaro. Apartan historion havas la elimino kaj forgesigo de la rusa nom-elemento Markoviĉ, kvankam tio ne plensukcesis. Poste la elimino de la nom-elemento Lazar sukcesis eĉ malpli. Sed la falsofaroj daŭris post la morto de Zamenhof.

Ankaŭ la vorton *internacia* oni taksis malavantaĝa en la patriotaj parolmanieroj en Orient-Eŭropo, Francio kaj Germanio same. En la opoziciantaj ŝtatoj *nacia* estis la pozitiva nocio kaj *internacia* ofte signifis judo, socialisto aŭ ambaŭ. Post la apero de *Lingvo Internacia* spontane aperis la vorto *Esperanto* kiel ĝia sinonimo. En la nova situacio multaj esperantistoj klopodis ekskluzivigi la vorton *Esperanto*, eĉ retrospektive, jam de 1887. El la difinoj de Esperanto paŝon post paŝo oni eliminis la nocion internacia.

La falsofarojn ne nur la iniciatintoj faris, sed ankaŭ tiuj, kiuj dum la sekva jarcento verkis apologiojn de la falsaĵoj. Finfine la publiko ricevis diversajn galimatiojn, kiel ekzemple la jena: “La pola Ludwik Zamenhof naskiĝinta en la pola urbo Bjalistoko kreis la artefaritan lingvon Esperanto sub la pseŭdonimo Doktoro Esperanto.” En tiu frazo krom la nomoj *Zamenhof* kaj *Esperanto* ĉio alia estas falsaĵo.

La falsaj datumoj aperadas en la granda plimulto de la enciklopedioj, referencaj libroj, en la gazetaro, kaj en la ĝenerala opinio. Sekve de la persistaj klopodoj de esperantistoj pluraj falsaj asertoj dogmiĝis. Ĉiam estis aŭtoroj kiuj rimarkis la falsaĵojn kaj publikigis la veraĵn datumojn kaj en Esperanto kaj en aliaj lingvoj, sed iliaj voĉoj nur lastatempe fortiĝis. En la 20-a jarcento la misinformado estis la “ĉefa fluo”. Pro fervoro de falsofarantaj esperantistoj la falsaĵoj aperis kaj en la esperantlingva literaturo, kaj en naciaj lingvoj, en diversaj konsultlibroj, precipe en enciklopedioj.

8. Nomfalsigo

Maimon kaj aliaj anstataŭ ekzamenado de dokumentoj faris longajn klarigojn etimologiajn, plenajn de faktoj kaj supozoj. Diferencigi ilin nun estas superflue, ĉar ne temas pri etimologio. Nomoj ja havas etimologion, sed elekti el la diversaj nomformoj estis tasko de la patro de LMZ kaj oficiale fiksi ĝin

³⁰Franclingva letero de Émile Javal al Zamenhof 1905-10-15; ludovikito (1985:197).

estis tasko de oficistoj tiutempaj. Ni ne rajtas elekti alian nomon por LMZ, nur konstati ĝin.

Post 1889 Zamenhof plej ofte verkis sub sia mallongigita nomo, *L. Zamenhof*, kaj en Esperantio oni menciadis lin kiel *d-ro Zamenhof*. La situacio ŝanĝiĝis kiam la eldonejo Hachette enkondukis la plumnomon *L. L. Zamenhof*. Tion ankaŭ Zamenhof “enkondukis” mendante novajn stampilojn kun la teksto *L. L. Zamenhof*, kaj de 1909 alterne uzis ĝin kun la malnovaj stampiloj.

Zamenhof neniam eksplikis, kion signifas *L. L.*, produkto de la kunlaboro kun la eldonejo Hachette. Li eĉ ne devintus tion fari, ja plumononj ne bezonas klarigon. Nur en la postzamenhofaj tempoj – supozante ĝin vera nomo – oni komencis eksplicigi la mallongigon, kaj aperis diversaj supozoj (*Lazaro Ludoviko*, *Ludoviko Lazaro*, *Lejzer Ludwik* k.t.p.). Necesas fiksi, ke Zamenhof kiel aŭtoro rajtis uzi ajnan plumnomon, ajnan pseŭdonimon, sed falsaĵoj estas ĉiuj ŝanĝoj kaj modifoj, kiujn ne li mem faris. Kaj kompreneble neniu el liaj plumnomoj fariĝis lia nomo anstataŭ LMZ.

Ekde 1913 kelkaj aŭtoroj la nomon Ludoviko metis en la unuan lokon, kaj Lazaro fariĝis la dua antaŭnomo (Zakrzewski 1913:3). Ekde tiam ekzistas du falsofarantaj skoloj; la pli malnova insistas je la unueco de Lazaro, sed la ludovikistoj persistas je la unueco de Ludoviko. La lastaj fariĝis pli popularaj. La zamenhofologo Naftali Zvi Maimon ne nur la nomon *Markoviĉ*, sed ankaŭ la nomon *Lazar* klopodis forgesigi. Tiucele li asertis tute senbaze, ke “post la doktoriĝo en 1885, la nomo Lazar publike ne plu aperas. Anstataŭ ĝi trovigas ĉiam: Ludoviko.” (Maimon 1978:50).

Necesas fiksi, ke nek *Lazaro Ludoviko*, nek *Ludoviko Lazaro* estis la antaŭnomoj de Zamenhof. La plumnomo *Lazaro Ludoviko Zamenhof* ekzistis, estas aŭtenta, kaj la plumnomo *Ludoviko Lazaro Zamenhof* estas postzamenhofa falsaĵo. Tamen *Ludoviko* kaj ĝiaj variantoj ekzistis kiel kromnomoj kaj Zamenhof uzis, eĉ ŝatis ĝin. Ekzemple en 1911 li aliĝis kiel la bangasto Ludwig Zamenhof al la banloko Bad Kissingen.³¹

Post la morto de Zamenhof estiĝis la falsa Ludovik-kulto. Anstataŭ studado de la aŭtentaj dokumentoj esperantistoj post la morto de LMZ klopodis elekti taŭgan nomon por li. Ili ne sentas la absurdaĵon de ajna rezonado; kio estus ilia primara tasko, estas ekster ilia intereso, kvazaŭ LMZ estintus super la rusaj leĝoj. Malkonsidero de la oficialaj dokumentoj eble la plej bizara fenomeno de Esperantio estas. Ilia malsukceso estas evidenta ankaŭ ekster Esperantio.

Esperantistoj abunde liveris falsajn informojn al neesperantistoj. Sekve el la ekzamenitaj 97 enciklopedioj³² nur en ses estas lia kompleta, vera nomo,

³¹Holzhaus 1973:364.

³²Rete legeblaj tekstoj estas nur kopioj de artikoloj de paper-enciklopedioj. Tial mi ekzamenis la paperajn enciklopediojn, escepte tiujn malnovajn, kiuj estas nur rete atingeblaj.

kiu povas esti referencilo. La nomo de *Lazar Markoviĉ Zamenhof* la unuan fojon aperis en la ukrainiaj enciklopedioj *Ukrainska Radjanska Enciklopedija* (uk1, uk2) en la sesdekaj jaroj, poste en kelkaj hungaraj enciklopedioj (hu11, hu12, hu17, hu19). En 15 aliaj enciklopedioj aperis nur mallongigitaj nomvariantoj konsistantaj el unu aŭ du elementoj de la nomo. *Lazar Zamenhof* estas en unu (sr1), *Lazarus Zamenhof* en tri (en5, en9, es1), simple nur *Zamenhof* estas en sep (fr7, hu1, hu3, hu6, hu7, it2, ru2), *Dr. Zamenhof* en tri (fr1, fr3, fr5) kaj *Eleazar Samenhof* en unu (hu14) enciklopedioj. Tiuj nomvariantoj estas aŭ mallongigoj de lia nomo, aŭ eraroj. Ili ne taŭgas por esti referenciloj, sed almenaŭ ne estas falsaĵoj.

Do en la lasta jarcento la informado pri la nomo de Zamenhof iom pli-boniĝis, sed tre malrapide. Entute 21 enciklopedioj informas pli-malpli ĝuste pri la nomo de Zamenhof. Tamen nur ses el ili informas tute precize, kaj ili aperis en la lastaj jardekoj. En 76 aliaj enciklopedioj oni trovas diversajn falsajn informojn.

Ne nur pri la nomo de LMZ, sed ankaŭ pri liaj plumnomoj oni povas legi plejparte erarajn kaj falsajn informojn. La Unuan Libron LMZ aperigis sub la pseŭdonimo *Dr. Esperanto*. La ĝusta informo pri tio troveblas nur en 9 enciklopedioj (de1, de7, de9, de10, de11, en8, en17, hu15, hu19, sr1); el ili 3 estas tiuj de la germana eldonejo Meyers. En aliaj enciklopedioj oni trovas tiujn falsajn informojn pri la pseŭdonimo de la aŭtoro: *Doctor Esperanto*, *doktoro esperanto*, *Doktoro Esperanto*, *Dottor Esperanto*, *D-ro Esperanto*, *dr. Esperanto*, *Esperanto*, *L. L. Zamenhof*, *Lazaro Ludoviko Zamenhof*, *Ljudvik Zamenhof* kaj *Ludovico Zamenhof*. Envere tiujn aŭtor-nomojn LMZ aplikis aŭ pli malfrue, aŭ neniam. La malĝustajn informojn la redaktoroj prenis el Esperant-lingvaj fontoj.

9. Amaso da falsaj informoj pretekste de antaŭnomtradukoj

Pro kaŝado de la referencnomo LMZ en Esperantlingvaj eldonaĵoj aperis amaso da falsaj informoj pri lia nomo. Oni povus ilin envicigi kaj klarigi sur multaj paĝoj, sed ni rigardu nur tiun solan numeron de la revuo *Esperanto*, oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, kiu ĝuste kuŝas sur mia tablo, de marto 2009. La antaŭnomoj de Zamenhof varias laŭ la plaĉo de la aŭtoroj: *L. L.* (p. 52), *Doktoro Esperanto* (p. 54), *Lejzer Ludwik* (p. 55), *Ludoviko Lejzer (Lazaro)* (p. 57).

Pluraj enciklopedi-redaktoroj prave eksuspektis pri la kompetenteco de esperantistoj, kaj forigis el la tekstoj ĉiujn antaŭnomojn kaj “asimilitajn nomformojn”. Restis en pluraj enciklopedioj nur la familia nomo Zamenhof.

Ĝuste kiel en artikoloj pri mezepokaj mastroj, kiuj estas menciindaj, sed oni ne povas scii pri ili detalojn.

En 1905 en juda enciklopedio aperis tio, ke “Mark estas la nomo de la patro” (ru-en1). Do li devus esti *Markoviĉ*. Ĝuste tiun fakton pri la patro neniu transprenis, sed oni surprizis la publikon per novaj kaj pli novaj nomoj de Zamenhof. Kvazaŭ li post sia morto estus ŝanĝanta sian nomon pli kaj pli ofte.

Kiu pensis, ke *Louis* estas franca antaŭnomo de Zamenhof, seniluziiĝos, ĉar trovos ĝin nur en unu enciklopedio, kaj tiu ne franca estas, sed angla (en12). En la franca ĝi aperis nur kiel unu elemento de duobla nomo kun dividostreko: *Louis-Lazare* (fr2). En la renoma franca Larousse ĝi aperis tiel en 1932. Sed poste en alia franca enciklopedio tio aperis jam sen dividostreko: *Louis Lazare* (fr4). En la francaj enciklopedioj tiu formo *Louis Lazare* disvastiĝis, sed post iom da tempo ankaŭ ĝi elmodiĝis. Laŭ la eldonejo Larousse Zamenhof en 1974 jam estis Ludwig, eĉ kvazaŭ li estus vivanta kaj alprenanta du novajn nomojn samtempe: *Ludwig Lazarus* kaj *Lejzer Ludwig* (fr6). Larousse “permesis” ambaŭ nom-kombinaĵojn, sed ne klarigis la kaŭzon de la inversa vicordo. La esenco de tiu ŝanĝo estis: anstataŭ unu falsa informo aperis du novaj falsaj informoj. Tamen Larousse en 1988 jam ne nur la formon *Louis* eliminis, sed ankaŭ la formo *Ludwig* fariĝis nedezirata (fr8). Ekde tiam la antaŭnomo de Zamenhof france estas *Ludwik*.

Ni rigardu la italan nomformon. *Louis* eĉ en Italio estis pli populara ol en Francio, almenaŭ ĝi longe restis en la kombinaĵo *Lázaro Louis* (it1). Sed fine ankaŭ italoj sentis la neceson freŝigi Zamenhofon kaj oni baptis lin *Lejzer Ludovik* (it3). Dume en la portugala aperis *Ludwig* (pt1).

En kelkaj eldonoj de la germana eldonejo Brockhaus la antaŭnomo de Zamenhof estis *Ludwig* (de2, de5), sed laŭ aliaj eldonoj *Lazarus Ludwig* (de3, de4, de6). Dume en la enciklopedioj de Meyers de 1906 ĝis 1980 (de1, de7) oni trovis nur *L. Zamenhof*. En 1981 Zamenhof tamen fariĝis *Ludwik* (de8). Tiun *Ludwik* transprenis ankaŭ la enciklopedio *Das neue Osteuropa*, eldonita en 1993 en Svisio (de9). Sed ĝuste tiam la eldonejo Meyers decidis “freŝigi” Zamenhofon per la antaŭnomoj *Ludwik Lazarus* (de10). Aliaj germanaj enciklopedioj tamen ne sekvis ĝin; eĉ nuntempe refoje aperis la antaŭnomoj *Ludwig* kaj *Ludwig L.* (de11). Oni povas konjekti, ke *Ludwig L.* devenas el la malnova *Lazarus Ludwig*, kvankam ekzistas ankaŭ aliaj solvoj.

Por parolantoj de la angla lingvo grava inform-fonto estis *Encyclopaedia Britannica*, kiu en 1910 (en1) jam menciis *L. Zamenhof*. Sed kiu estas tiu *L.*? La enigmo duobliĝis en 1926, ĉar laŭ la nova eldono de *Encyclopaedia Britannica* jam temis pri *L. L. Zamenhof*. Nur post la dua mondmilito en 1958 kaj nur por la aŭstralianoj evidentiĝis, ke temas pri *Lazarus* (en5). Post *The Australian Encyclopaedia* ankaŭ la eldonejo Penguin akceptis tiun

solvon (en9). Sed kio pri *L. L.*? En 1958 ankaŭ tiun enigmon provis solvi *Everyman's Encyclopaedia* je *Ludwig Lazarus* (en7), sed je tiu solvo ne estis konsento. Laŭ *The Encyclopedia Americana* temas pri *Lazarus Ludwig* (en8), sed nur por usonanoj. Laŭ la internacia eldono de la sama enciklopedio temas pri *Ludovic L.* (en15), kvankam iom poste *Academic American Encyclopedia* deklaris lin *Ludwik Lazar* (en17). Pli malfeliĉa sorto trafis legantojn de aliaj enciklopedioj, en kiuj laŭ la artikolo *Esperanto* temas pri *Louis*, sed laŭ la artikolo *Zamenhof* pri *Ludwig Lazarus* (en12, en13). En la jaro 1991 *The New Encyclopaedia Britannica* riĉigis plu la anglan lingvon per la plua “angla formo” *Ludwik Lejzer* (en19). Tiu nomo disvastiĝis en italaĵ, hispanaj kaj francaj enciklopedioj en la okdekaj-naŭdekaj jaroj, tamen ne en la anglaj. Tiu serio de falsaj informoj certe ne finiĝis, car la anglalingvaj eldonejoj ankoraŭ ne provis ĉiujn matematike eblajn nomkombinaĵojn kaj nomvariaĵojn.

La hungara formo de *Ludoviko* devus esti *Lajos*, sed tiu nomo aperis nur en unu enciklopedio (hu5), aliloke troveblas *Ludwig Lazarus* (hu2), *Lazar Ludwig* (hu4), *Ludwik* (hu21), *L. Ludowik* (hu9, hu13), *L. L.* (hu8), *L.* (hu10) kaj *Eleazar* (hu14). Ankaŭ hungaraj esperantistoj ne intencis konstati lian nomon, sed nur elekti ion plaĉan, propagandcele taŭgan.

En la Esperanta subkulturo kvazaŭ religia kredo, pseŭdo-aksiomo estas, ke la nomo *Lazaro Ludoviko Zamenhof* estas mondvaste konata. Envere tiu nomo ekster Esperantio estas preskaŭ tute nekonata. El la 97 enciklopedioj de la mondo nur en unu estas *Ludoviko* (fi1) kiel antaŭnomo de Zamenhof kaj en unu estas la antaŭnomoj *Lazaro Ludoviko* (hu14). Pri la mistera vorto *Ludoviko* la leganto ekscios nenion, eĉ ne tion, ke ĝi devus esti Esperanta vorto. Tiu estas la sola vorto, kiu aperas kaj en la finna kaj en la hungara enciklopediaj artikoloj. Neinformita leganto eĉ tion povus konkludi, ke tiu *Ludoviko* estas praa finno-ugra vorto pruvanta la parencecon de tiuj lingvoj.

Ne nur la antaŭnomoj *Lazaro Ludoviko* estas preskaŭ tute nekonataj ekster Esperantio, sed senbaza kredo estas ankaŭ tiu kredo, ke la Esperantan vorton *Ludoviko* oni tradukis, kaj en etnolingvaj tekstoj aperis ĝiaj asimilitaj formoj (*Ludwig*, *Louis*, ktp.). Fakte la falsaj nomoj disvastiĝis tute alimaniere.

En la ekzamenitaj enciklopedioj mi trovis la jenajn 34 plum-antaŭnomojn de Zamenhof: *Eleazar*, *L.*, *L. L.*, *L. Ludowik*, *Lajos*, *Lazar*, *Lazar Ludwig*, *Lazar Markoviĉ*, *Lázaro Louis*, *Lazaro Ludovico*, *Lazarus*, *Lazarus Ludovic*, *Lazarusludwig*, *Lazarus Ludwig*, *Lejzer Ludovik*, *Lejzer Ludwig*, *Lejzer Ludwik*, *Ljudvig-Lazar*, *Ljudvik*, *Ljudvik Lazar*, *Louis*, *Louis Lazare*, *Louis-Lazare*, *Ludoviko*, *Ludoviko Lazaro*, *L'udovit Lazár*, *Ludowik*, *Ludwig L.*, *Ludwig*, *Ludwig Lazarus*, *Ludwig Lejzer*, *Ludwik*, *Ludwik Lazar* kaj *Ludwik Lazarus*. Nur tri el ili estas ĝustaj informoj: *L.*, *Lazar* kaj *Lazar Markoviĉ*, kvankam menciindas, ke en enciklopedio nur la lasta, plena nomo akcept-

eblas. La aliaj 31 informoj estas falsaj, t.e. ili estas aŭ plum-antaŭnomoj aŭ nur fikciaj elpensajoj. Multaj el ili teorie povus esti diverslingvaj variantoj de la plum-antaŭnomoj, sed fakte ili estas false (aŭ tute ne) tradukitaj en la cel-lingvon. Pro la kaŝado de la fiksa, neŝanĝebla referencnomo ili estas nur falsaj, iel “sendependiĝintaj” nomoj, kiuj aperis kaprice jen en tiu, jen alia teksto, sendepende de la lingvo de la teksto, sendepende de la fontlingvo kaj sendepende de tio, ĉu ili originale ekzistis aŭ ne. Etimologia rezonado kondukas nenien.

Kelkaj el la falsaj nomoj vere ekzistis kiel plumnomoj. Sed kion prezentas la enciklopedioj pri la plumnomoj de LMZ? Laŭ la enciklopedioj li havis 13 plumnomojn: *D-ro Esperanto*, *Doctor Esperanto*, *Doktoro Esperanto*, *doktoro esperanto*, *Dottor Esperanto*, *Dr. Esperanto*, *dr. esperanto*, *Esperanto*, *L. L. Zamenhof*, *Lazaro Ludoviko Zamenhof*, *Lazaro Ludoviko Zamenhof*, *Ljudvik Zamenhof* kaj *Ludoviko Lazaro Zamenhof*. Mankas spaco por analizi, ke kiuj el ili estas originalaj, t.e. uzitaj de Zamenhof, kaj kiuj estas skrib-eraraĵoj, kiuj estas falsaĵoj, t.e. elpensajoj de iu alia, eventuale post longaj jaroj post la morto de Zamenhof. Krome la plimulton de la zamenhofaj plumnomoj la enciklopedioj neniam menciis.

Ankaŭ je la plumnomoj leviĝas la demando pri kies plumnomo temas. Nur lia aŭtenta nomo povas esti komuna, aŭtenta referencilo. Krom falsaj nomoj aperadis ankaŭ falsaj plumnomoj post lia morto, kaj la neakordigeblaj, malfacile identigeblaj datumoj plimultiĝis. Fanatikaj esperantistoj klopodas ekskluzivigi iun aŭ alian, kiu pleje plaĉas al ili. Malofte venas en la kapon ke ili ne rajtas elekti, nur konstati la nomon kaj la plumnomojn de LMZ.

En la ekzamenitaj 97 enciklopedioj mi ne trovis alian internacie konatan personon, ĉirkaŭ kies nomo estus kreskinta tia ĝangalo de falsaj informoj. Eĉ nur iom similan personon mi ne trovis. Tiu fuŝaĵ-komplekso estas unika kreaĵo de esperantistoj kaŝintaj la referenc-nomon LMZ. Ion similan, sed pli saĝe formulitan eble oni povus trovi nur en la dosieroj de Interpol pri kaŝiganta krimulo eskapanta de lando al lando.

En etnolingvoj pli frue komenciĝis la elimino de la falsaj datumoj ol en la Esperantlingva literaturo. La nomo Lazar Markoviĉ Zamenhof en 1960 aperis la unuan fojon en ukraina (uk1), kaj en 1992 en hungara ĝeneralaj enciklopedioj. En hungarlingva revuo unue en 1997 aperis lia nomo (Rados 1997, p. 229). En fakenciklopedioj la unuan fojon en 1999, poste en 2003 aperis lia nomo (hu17, hu19). Ambaŭ pri la lingvoj de la mondo, redaktita de la lingvisto István Fodor, eksperto pri afrikaj lingvoj kaj planlingvoj, kaj la artikolojn verkis Zsuzsa Varga-Haszonits. Ankaŭ en la Esperantlingva gazetaro ekde la naŭdekaj jaroj, sed en la reto nur jardekon poste, aperadis lia nomo. En 2006 aperis la unua libro pri la historio de Esperanto, en kiu oni povas legi (t.e. kiu ne klopodas kaŝi) la nomon *Lazar Markoviĉ Zamenhof*

(Korĵenkov 2005:5–7), kvankam la aŭtoro tie ne distingas la aŭtentan nomon de la falsaj. Tamen, prisilento de la dokumentoj ne plu eblas.

10. Falsa naskiĝurbo kaj falsa naskiĝlando

La ŝtatoj fiksas la geografiajn nomojn en oficialaj dokumentoj, laŭ zorge difinitaj preskriboj, en difinita, oficialigita etna lingvo. Pere de tiel fiksita geografiaj nomoj la geografiaj lokoj fariĝas identigeblaj. Tiuj dokumentoj estas la oficialaj loknomoj, kiujn en la 19-a jarcento jam ĉiuj ŝtatoj kompilis pri sia regata teritorio. La loknomojn oni akordiĝis kun la mapoj, kiujn la ŝtatoj produktis por militaj aŭ ekonomiaj celoj. La loknomoj kaj la mapoj fiksas la staton ĵus validan (latine: *status quo*). Kompreneble okazadas ŝanĝoj, sed oni daŭre sekvas ilin per kompletigoj, per oficialaj aldonoj kaj per novaj eldonoj. Datumoj de la loknomoj estas ne nur geografiaj, sed ankaŭ juraj kaj historiaj faktoj. Loknomo estis valida nur ĝis ĝia oficiala ŝanĝo, sed ne ŝanĝebla retrospektive. Naskiĝlokon oni devas difini laŭ la aktuala, oficiala loknomo, kaj nur tiu datumo povas aperi en oficialaj dokumentoj. Post limŝanĝo sur la konkerita, akirita teritorio kutime ŝanĝigas ĉiu loknomo, ja ĉiu loko ricevas nomon en la lingvo de la konkerinta ŝtato.

La teritorio de la iama Pollando en la 19-a jarcento apartenis al Aŭstrio, Germanio kaj Rusio, sekve oni parolis pri germana, rusa kaj aŭstra Polujoj. Restaĵo de iama ŝtato estis Pola Reĝlando en Rusio, negrava kaj malkreskanta aŭtonomio, sed Bjelostoko estis ekster ĝi. Krome, en 1874 eĉ tiu Polujo ĉesis kaj ekde tiam sur ĝia teritorio oni establis rusajn guberniojn.

Celo de la polaj naciistoj estis restarigo de la sendependa Pollando sur la teritorio de la iama Pola Reĝlando, sed laŭ aliaj sur la teritorio de Pola-Litova Regno en la 18-a jarcento, t.e. dekoble pli granda teritorio. Laŭ ilia koncepto Bjelostoko nepre devos esti en Pollando, sed laŭ rusaj naciistoj ĝi devas resti parto de Rusio. Dume aspiris la urbon ankaŭ litovaj, germanaj kaj belorusaj naciistoj.³³ Kompreneble neniu el ili konsideris la volon aŭ almenaŭ la opinion de la judoj, konsistantaj du trionojn de la loĝantaro.

Jam antaŭ la unua mondmilito polaj esperantistoj demonstrante la celon de sia naciisma movado anstataŭ la urbonomo Bjelostoko (esperantigita el la rusa Белостокъ) iniciatis la uzon de *Bjalistoko* (esperantigita el la pola nomo *Białystok*). La celo de naciisma movado kiel politika starpunkto estas respektinda fakto, sed paroli pri “Bjalistoko en Pollando en 1859” estas malrespektenda falsaĵo.

Bjelostoko (Grodna gubernio, Rusio) kiel naskiĝloko de Zamenhof estas porĉiama informo, eterna datumo. Tion ŝanĝas nek ajna posta limŝanĝo

³³La urbo mem por iom da tempo apartenis al ĉiu el la aspirantoj escepte la litovojn.

aŭ nomŝanĝo, nek eventuala kompleta malapero de la urbo.³⁴ Same indiferecaj estas etimologiaj konsideroj.³⁵ Alia afero estas, ke ĉu pro rusofobio ĉu pro politikaj aspiroj kelkaj polaj esperantistoj ne akceptis la Esperantan urbonomon Bjelostoko, kaj komencis politikan manipuladojn perlingvan. Ili kreis la alian Esperantan urbonomon Bjalistoko (Zakrzewski 1913), kaj tion ekuzis kiel naskiĝlokon de Zamenhof. La ne ekzistantan Bjalistokon ili virtuale forigis el la Grodna gubernio, kaj metis en Pollandon.³⁶

Pri la naskiĝloko la ĝusta informo aperis nur en *Encyclopaedia Britannica* eldonita en 1910 (en1), en *Révai lexikon* eldonita en 1926 (hu2) kaj en kelkaj aliaj enciklopedioj (en11, es1, fr2, pt1, ru-en1, ru-en2, ru-en3). En plimulto de la enciklopedioj estas la falsa datumo Bjalystok, Pollando.

Maimon (1978:199) prave rifuzis ankaŭ la argumenton el la jaro 1911, laŭ kiu “etnologie Bjalistoko estas Polujo”, kaj “kvankam ĝi estas ekster Pola Reĝlando, ĝi apartenas sendispute pola etnografia teritorio.” Tiuj estis argumentoj de la pola nacia imago, de la romantika naciisma legendaro kaj nur provo pravigi falsan aserton. Dum la vivo de Zamenhof la plimulto (inter du trionoj kaj tri kvaronoj) de la bjelostoka loĝantaro estis la jide parolanta judaro (Maimon 1978:19-20). Fakte en tiu urbo kaj rusoj kaj poloj estis etnaj minoritatoj. Sed, sendepende de tio, kaj pri la nomo, kaj pri la aparteno ĉiam tiu decidis, kiu havis pli grandan potencon.

11. Etnaj antaŭjuĝoj ĉiuflanke

Origine la plej grava motivo estis forgesigi, ke Zamenhof estis judo. Estiĝis granda literaturo celante apogi tiun falsan aserton. Oni povas legi detalojn pri tio, ke li junaĝe ekvivis en Varsovio, parolis pole, estis populara inter poloj, havis polajn amikojn, eĉ polan karesnomon. Tiu lasta aserto estis aparte ŝatanta argumento de la falsofarantoj; krome tiuj faktoj pri la polaj ligoj de Zamenhof estas veraĵoj. Nur la konkludo estis falsa. Siatempe Zamenhof mem estis la unua, kiu refutis la aserton pri sia pola identeco. Pri la falsaĵoj oni trovas kompletan trarigardon en la libro de Sikosek (2003:300–309). Malgraŭ

³⁴Same kiel la imperiestro Marcus Aurelius naskiĝis en la romia urbo Aquincum (provinco Pannonia), kaj ne en la III-a distrikto de la urbo Budapeŝto, Hungario. Aŭ: la filozofo Immanuel Kant vivis nur en la urbo Königsberg, Prusio, kaj neniam en la urbo Kaliningrado (Калининград), Rusio.

³⁵Ankaŭ en la nova PIV (2002) estas du nomoj: Bjelostoko por la rusia urbo kaj Bjalistoko por la pollanda urbo. Same estas ankaŭ en kelkaj etnolingvoj, ekzemple en la hungara: Bjelosztok (en Rusio) kaj Białystok (en Pollando). En pluraj aliaj etnolingvoj tiu urbonomo ne ŝanĝiĝis; ĉiam estis kaj restis ekzemple en la rusa lingvo Белостокъ aŭ Белосток, kaj en la pola Białystok.

³⁶Tute alia afero estas ke post kelkaj jaroj fakte reaperis la ŝtato Pollando, kaj, kiam post aventura historio packontrakto fiksas ĝiajn limojn, Bjalistoko jam estis ene de ili.

la fortostreĉoj de la falsofarantoj ili neniam sukcesis ĝenerale kredigi tiun falson.

Laŭ 41 enciklopedioj li estis polo. Ok enciklopedioj elturniĝis tiel, ke anstataŭ klarigo ili emfazis nur la varsovianecon de Zamenhof. Tridek enciklopedioj elturniĝis tiel, ke nenion ili menciis pri lia etna identeco (kvankam en simile ampleksaj aliaj artikoloj pri aliaj famaj personoj tion ili menciis, kelkfoje eĉ kun detaloj). En 19 enciklopedioj oni trovas parte verajn informojn. Laŭ tiuj

judo (en11);
 jude parolanta pola judo (hu18);
 pola judo (en5, en7, en9, en10, en16, fi1, hu15, it2);
 ruso (en1, en8, es1, fr1, fr2, fr3, fr4, ru-en1);
 polo kaj judo (eo1).

La neesperantista publiko la unuan fojon en 1991 povis legi en enciklopedio, ke Zamenhof estis judo el ruslingva familio. *The New Encyclopaedia Britannica 12* (en19) elfosis tiun informon el amaso da falsaj informoj.

Kiuj ne povas akcepti la faktojn? Poloj, rusoj, judoj, katolikoj kaj esperantistoj, kiuj mem havas antaŭjuĝojn, aŭ timas la opiniojn de la ĉefa fluo en siaj medioj. La falsadojn iniciatinta Javal mem estis judo. Certe ne antisemito, sed li timis la antisemitajn opiniojn. Dum cent jaroj la situacio ne multe pliboniĝis. Inter la polaj esperantistoj verŝajne ne estas antisemitoj, sed en la socio certe, same kiel rusofoboj. Do akcepti la fakton “rusa judo” estas tiel malfacile, ke oni preferas elturniĝajn klarigojn de la nocio etno. Kaj polaj katolikoj iel regas la internacian katolikaron.

Kiel la misinformado funkcias praktike? Jen ekzemploj. Foje redaktoro de katolika enciklopedio petis min verki Esperant-rilatajn artikolojn. Mi liveris ilin kaj la redaktoro estis ege kontenta, sed komparante ilin kun polaj katolikaj fontoj anstataŭ “rusa judo” enmetis “polo”. Tion li faris bonintence, lastmomente, sen mia scio, ĉar li rimarkigis ke mi “evidente eraris, verŝajne pro malatento”. Je la Bjalistoka UK estas malfacile ne rimarki la pluvivantajn rusofobion. La revuo *Esperanto* prezentas la historion de la urbo, sed apenaŭ pri la vivperiodo de Zamenhof. Multe pli detale oni prezentas la antaŭzamenhofajn kaj postzamenhofajn periodojn.

Similaj antaŭjuĝoj floras inter rusoj, kiuj ne povas kompreni, ke iu povas esti “rusa judo”, ja “oni estas aŭ ruso, aŭ judo”, kvankam ili ne rifuzas la nociojn “franca judo”, aŭ “germana judo”. Ankaŭ inter rusaj esperantistoj mi rimarkis la saman pensmanieron. Krome plej ofte poloj jam aŭdis pri Zamenhof, sed por rusoj la vortoj kaj *Zamenhof* kaj *Esperanto* sonas ekzote.

Plej obstine kontraŭstaras esperantistoj, kiuj ne volas scii, nur kredi. Ili kredas fikciaĵojn simile al naciistoj ĉie en la mondo. Kaj se ili jam ne kredas,

ili timas la aliajn naciistojn. Kaj Waringhien, kaj Golden suferis pro la esperantista cenzurado, kiam ili volis publikigi nur onojn de la Zamenhof-falsaĵaro (Golden 1988:23).

Mi spertis la saman sintenon de esperantistaj redaktoroj, kvazaŭ estus postulato malkonsideri ekzistantajn dokumentojn, kaj anstataŭ ili sed abunde trakti la supozojn. Foje iu eĉ eksplikis, ke en la kazo de Zamenhof ne validis la rusaj leĝoj, ĉar li estis inter la plej grandaj geniuloj de la homaro.

Ofte levigas la demando: kio estis la patrio de Zamenhof? Li estis rusa judo vivanta en Varsovio kaj devenanta el la urbo Bjelostoko.

En la Rusa Imperio pro la grandaj distancoj kaj grandaj socigeografiaj diferencoj vere grandan signifon havis la regionismo kaj la samlokeco. Laŭ geografiaj-historiaj regionoj Bjelostoko situis en la regiono Litvo. Pri la deven-regiono Litvo, ĝia fizika geografio kaj etnogeografio amaso de artikoloj kaj libroj de esperantistoj donas detalan kaj fidindan bildon. Sed pri la historia fono male: Pollando ofte aperas kvazaŭ sentempa, abstrakta lando, kaj pri la plurfojaj disdividoj de Pollando en la 18-a, 19-a kaj la 20-a jarcentoj kaj pri la aparteno de Bjelostoko al Rusio, Prusio kaj Bjelorusio neniu Esperanta libro informas precize. Plej ofte nura celo de la aŭtoroj estis konfirmi tiun falsaĵon, ke Zamenhof naskiĝis en Pollando.

En la jaro 1933 aperis *Enciklopedio de Esperanto* ĉe la eldonejo Literatura Mondo en Budapeŝto. Sed pri la nomo kaj etna identeco de Zamenhof ĝi ne estas pli fidinda ol la aliaj tiutempaj enciklopedioj. Tiutempe ankaŭ en Hungario ricevis impeton la antisemitismo, kaj la redaktoroj devis esti tre singardaj. Malgraŭ la singardemo, prisilentoj kaj memcenzuro la redaktoro kaj eldonanto Vilmos Bleier en 1937, jaron antaŭ la unua kontraŭjuda leĝo, jam devis prepari sian fuĝon kaj la (fine sensukcesan) elsavon de la eldonejo al Fora Oriento. Li mortis en Parizo, en la tago de enmarŝo de la germanaj trupoj.

Certe singardemo de la redaktoroj kontribuis al tio, ke el la rusaj kaj polaj enciklopedioj oni povas ekscii nenion pri la deveno de Zamenhof. En Orienta Eŭropo kaj judofobaj kaj rusofobaj tendencoj prosperas ĝis hodiaŭ.

12. Anstataŭ referencnomo nom-bazaro en la bibliotekaj inform sistemoj

Esperantistoj ne nur la nomon de Zamenhof, sed ankaŭ liajn plumnomojn falsis. Ekzemple Edward T. Wojtakowski, en biblioteka katalogo de la Katolika Universitato en Lublin (Wojtakowski 1979:126) neglektis fundamentan regulon de katalogado, laŭ kiu sen ajna ŝanĝo oni devas enkatalogigi pseŭdonimon. Li simple “korektis” la titolpaĝajn pseŭdonimojn *Dr. Esperanto*, ekzemple en la libro *Język międzynarodowy* (eldonita en 1887), al *Lazaro*

Ludoviko, sen ajna referenco. Rimarku ke la Esperanta vorto *Ludoviko* eĉ ne ekzistis en la jaro 1887.

Oni trovas la saman referenc-nomon de internacie konataj aŭtoroj en ajna granda biblioteko de la mondo, escepte ĉe Zamenhof. Katalogoj de tiuj bibliotekoj, en kiuj estas pluraj esperantaĵoj aŭ Esperanto-kolektoj, aplikis diversajn referenc-nomojn. Tiel la nocio referenc-nomo mem perdas sian sencon. Referenc-nomo povas esti sole unu, t.e. la aŭtenta nomo de la aŭtoro. Estas interese, kiujn falsajn referencnomojn oni provis generi el la veraj kaj el la falsaj plumnomoj. Jen la rete atingeblaj katalogoj (kaj en krampoj mi montras la rete ne atingeblajn):

- L. L.*, Germana Esperanto-Biblioteko, Aalen;
 Лазарь Людовигович [*Lazar' Ljudvigoviĉ*], Российская государственная библиотека [Rusia Ŝtata Biblioteko], Moskvo,
Lazar Ludwik, Library of Congress, Washington; Universitetsbiblioteket, Uppsala; Österreichische Nationalbibliothek – Internacia Esperanto-Muzeo, Wien (→ Hube – März 1975);
Lazaro Ludoviko, Országos Idegennyelvű Könyvtár (→ Pataki 1991), Budapeŝto; Universiteit van Amsterdam; Katolicki Uniwersytet, Lublin (→ Wojtakowski 1979);
Lazarz Ludwik, The British Library, Londono;
Lejzer Ludwik, La Bibliothèque nationale de France, Parizo;
Lejzer Ludwyk, Butler Library, EAB, ĉe Barlaston, proksime al Stoke-on-Trent;
Ludwig L., Nacionalna i Sveučilišna Knjižnica, Zagrebo;
Ludwig Lazarus, Österreichische Nationalbibliothek (Hauptkatalog), Vieno; Fővárosi Szabó Ervin Könyvtár, Budapeŝto; Somogyi-könyvtár, Szeged (→ Gyuris 1967);
Ludwik, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza, Poznań; Uniwersytet Jagielloński, Krakovo;
Ludwik L., Österreichische Nationalbibliothek – Sammlung für Plansprachen und Esperantomuseum, Vieno;
Ludwik Lazar, The Hebrew University, Jerusalemo; Ülikooli Raamatukogu, Tartu;
Ludwik Lazarz, Narodna in univerzitetna knjižnica, Ljubljana; Ülikooli Akadeemiline Raamatukogu, Tallin.

Ĉiuj estas falsaj referenc-nomoj, elektitaj el amaso de liaj plumnomoj veraj, falsaj kaj fuŝaj. Diversaj antaŭnomoj varias kaj kombiniĝas diversmaniere, eĉ en diversaj katalogoj de la sama biblioteko. En la slipara kaj la libro-forme aperinta katalogoj de la plej granda Esperanto-kolektaĵo de la mondo

la referenc-nomo enhavis la antaŭnomojn *Lazar Ludwik*, sed en la reta katalogo de la sama biblioteko nun estas *Luwik L.*, kaj en la ĉefkatalogo de la biblioteko *Ludwig Lazarus*.³⁷

Plej konsekvence poligis Zamenhofon la bibliotekoj en Poznań kaj Krakovo, kaj la originalan antaŭnomon *Lazar* metis en la duan lokon, poste retrospektive poligis la tri-elementan rusan nomon al du-elementa pola nomo tiel, ke neniu restis el la originalaj antaŭnomoj.

En Hungario en la Fajsz-kolektaĵo la referenc-nomo *Zamenhof* havas la antaŭnomojn *Lazaro Ludoviko*, sed en alia biblioteko en Budapeŝto kaj en la urbo Szeged *Ludwig Lazarus*.

La rusaj bibliotekistoj supozis trovi la ĝustan referenc-nomon, kaj jen en la katalogoj de unueca ŝtata biblioteka reto iliaj verkoj estas sub la nomo Лазарь Людвигович Заменгофъ [*Lazar' Ljudvigoviĉ Zamenhof''*]. La dua antaŭnomo ĉi tie signifas, ke la patro de Lazar estis Ludoviko. Paradokse tiu grotesko memorigas pleje al la vera nomo de Zamenhof, ja la finaĵo *-oviĉ* en la dua elemento estas ankaŭ en la originala nomo *Markoviĉ*.³⁸ Tiu *Ljudvigoviĉ*-kazo estas la pinto de tiu granda sterkejo kiun generacioj de esperantistoj falsofare produktis kaj konstante plialtigis.

13. Falsaĵoj gravuritaj en ŝtonon kaj en cerbojn

Menciindaj faktoroj estas ankaŭ la Zamenhof-statuo kaj memortabuloj de la mondo, kiujn oni starigis laŭeble en bone videblaj, turisme frekventataj lokoj, kie oni ofte legas kaj fotas ilin. Multaj memortabuloj havas tekston en la spirito de Zamenhof, sed aliaj atestas je provoj por alproprigi Zamenhofon por iu aŭ alia etno. Estas malfacile trovi memortabulon sen falsa datumo, kaj la falsaĵoj varias. Neeviteble iam oni rimarkas, ke la datumoj sur ili diferencas, kaj komenciĝas “korektoj”, t.e. unu falsan datumon oni ŝanĝas al alia. Pro nekono de la ĝusta referencilo kompreneble oni venas al diversaj nekontentigaj solvoj, kaj la situacio kiel tuto restas senŝanĝa: malbonega.

La unua falso okazis tuj post la morto de Zamenhof, antaŭ lia enterigo. Polaj esperantistoj mendis kaj starigis la tombstonon kun la surskribo *Ludwik Zamenhof*. Poste internacia komitato ne akceptis tiun nomon, kaj sur la definitivan tombonumenton starigitan en 1926 oni gravuris *Lazaro Ludoviko Zamenhof*. La klopodoj por forigi ankaŭ lian unuan antaŭnomon tiutempe ankoraŭ ne disvolviĝis.

³⁷En la slipara katalogo de la Upsala universitata biblioteko (ne rete alirebla) lia nomo estas donita tiel: *Lioudovik Lazar Zamenhof*.

³⁸Pluaj paŝoj de ĝisostaj ludovikistoj, ludwikistoj k.s. post la apero de *Lazar Ljudvigoviĉ* povos esti enkonduko de pluaj falsaĵoj, kiuj estus almenaŭ pli amuzigaj, ekzemple *Ludwik Patroviĉ*, *Lazar Esperantoviĉ* kaj *Ludoviko Pollandoviĉ*.

Pri la hungariaj memortabuloj ni disponas pri kompleta kaj preciza katalogo de iliaj tekstoj.³⁹ Laŭ tiu la antaŭnomoj de Zamenhof varias de urbo al urbo:

Lajos en Debrecen;
L. Lajos en Miskolc;
Lazar Ludwig en Dombóvár;
L. L. en Budapeŝto kaj Győr.

Falsaĵojn plej efike oni povas disvastigi per lernolibroj. Dum cent jaroj aperis multegaj Esperanto-lernolibroj en Hungario, kun amaso de diversaj falsaj informoj. Tion, ke la naskiĝloko de Zamenhof estis Bjelostoko, Grodnogubernio en Rusio, sciis nur tiuj, kiuj lernis Esperanton el lernolibroj eldonitaj antaŭ la unua mondmilito, antaŭ la poliga ofensivo. En siaj lernolibroj Gyula Baghy en 1928 enkondukis la unuan antaŭnomon *Ludoviko*, kvankam Kálmán Kalocsay insistis je *Lazar*. Malgraŭ la klopodoj de Kalocsay la unua antaŭnomo *Lazar* iom post iom ricevis la duan, sekundaran lokon, kaj post la morto de la tria famulo István Szerdahelyi ĝi tute malaperis. Anstataŭ *Lazar* aperis la falsaĵoj *Ludwik* (Haszpra 2000), sed poste *Ludwig* (Szilvási 2004). Aperis ankaŭ ĝustaj: en la hungaraj lernolibroj kutime aperis la termino *Lingvo Internacia*, kaj jam eĉ la titolo de la lernolibro de Szilvási estis *Esperanto – internacia lingvo*. En tiu lernolibro la unuan fojon aperis ankaŭ tiu ĝusta informo, ke Zamenhof estis aŭtoro de lingvoprojekto.

14. Maldistingo inter lingvoprojekto kaj lingvo

“Mi estas iniciatoro” precizigis sian rolon Zamenhof kontraŭ tiuj, kiuj ne komprenis la diferencon inter lingvoprojekto kaj lingvo. Tamen nur post cent jaroj la unuan fojon aperis tiu fundamenta fakto en enciklopedioj (hu11, hu16).

La unua paŝo de tiu iniciato estis kreo de lingvoprojekto. Zamenhof estis “la kreinto de la lingvoprojekto” (uk1), aŭ “kreinto de la kadro, de la skemo de la lingvo” (de9), “planinto de la lingvo” (hu20, hu21).

Kiel lingviĝis la lingvoprojekto? Tiel, ke el homoj kun diversaj gepatraj lingvoj estiĝis komunumo por apliki ĝin por sia interna komunikado. La komunumanoj parolis kaj skribis la lingvon, verkis en ĝi kaj tradukis al ĝi. Pere de tiu agado la lingvoprojekto lingviĝis. Ne sole Zamenhof mem, sed tiu internacia lingvo-komunumo kreis la lingvon (hu11, hu16), kvankam la

³⁹Eszerantáliák Magyarországon, www.vortaro.hu (2006-06, kun fotoj), www.eszperanto.hu/ = w3.hdsnet.hu/eszperanto/zeo-hu/ (2006-05, kun fotoj), hungario.hu/esencoj/dokumentaro/ = docs.google.com/View?docid=dggx8g7z_20fcktgr (2007-10, sen fotoj).

iniciatoro estis ĉefrolulo en tiu procezo, elstara, distingita ano de tiu komunumo.

Ĉu Zamenhof estis la “elpensinto” de la lingvo (en21)? Ne. Tio estas malpreciza, malklara, falsa aserto, kiu ne enhavas, nur kovras la esencon, same kiel la “fondinto” (fr1), “prezentanto” (de7, de12), “proponanto” (nl1), “fondinto-kreinto” (ru1), “publikiganto” (de6, hu15). Laŭ 23 enciklopedioj li estis “kreinto”, kaj laŭ 17 enciklopedioj “inventinto” de la lingvo. La diversaj misaj asertoj ofte ne en si mem nebuligas la veran rolon de Zamenhof, sed en diversaj kombinaĵoj: fondinto-kreinto, planinto-ellaborinto, inventinto-evoluiganto, inventinto-proponinto, k.t.p. Aliaj emfazas, ke li mem eldonis sian projekton, kiu sendube estas fakto, sed nur negrava detalo, kaj entute ne pri la eldono temas.⁴⁰

15. Lingvo Internacia

La postulatojn de Komenský LMZ precize realiĝis en sia projekto, kvankam li verŝajne ne konis la verkon de sia spirita antaŭulo. Komence ankaŭ Zamenhof uzis la kutimajn terminojn: la nomo de la unua, ne publikigita versio de lia lingvoprojekto estis *Lingve Universala*.

Zamenhof rimarkis, ke tiu vorto *internacia* estus oportuna por precize distingi la novan lingvon de Universala Lingvo, kaj la titolo de la libro aperinta en 1887 jam estis *internacia lingvo*. Ĝia skribmaniero poste baldaŭ ŝanĝiĝis, ĉar Zamenhof enkondukis ankaŭ la formojn majusklaĵn: *Internacia Lingvo* kaj *Lingvo Internacia*.⁴¹

Laŭ 80 procentoj de la enciklopedioj tamen ne Lingvo Internacia aperis en 1887, sed ia *arta lingvo*, *artefarita lingvo*, *helplingvo*, *neŭtrala lingvo*, *inventita lingvo*, *fonetika lingvo*, k.t.p. Falsaj estas ankaŭ la kombinaĵoj *internacia helplingvo*, *planita helplingvo*, *mondhelplingvo*, *artefarita internacia lingvo*, k.s. Falsaj estas ankaŭ tiuj kombinaĵoj, kiuj enhavas kvazaŭ laŭdajn vortojn: *la sola funkcia helplingvo*, *la ĝis nun plej sukcesa artefarita lingvo*, *Lingvo Internacia mond-helplingvo*, k.s. Nek la vorto *internacia*, nek la vorto *lingvo* estas anstataŭigebla per alia vorto, ekzemple *idiomo*. Falsa difino estas, ke

⁴⁰La *Fundamento de Esperanto*, publikigita en 1905 (1963:37), parolas pri “la kreinto de Esperanto” kaj “la aŭtoro de Esperanto”, do pri tiu, kiu jam kreis la lingvoprojekton en 1887. En 1905 li estis inter la kreantoj de la lingvo, kvankam sendube la aŭtenta, la plej renoma ĝis la fino de sia vivo.

⁴¹La procezo planediĝo aŭ tutmondiĝo estas unusola, unika fenomeno, sekve povas esti nur unu Internacia Lingvo (tutmonda). Majuskle, ĉar ĝi ne estas spontana, sed konscia, homa kreaĵo. Ĉar konscia, homa, unika kreaĵo oni devas skribi ĝin majuskle, kiel *Biblion*, *Linukson*, k.t.p. Tute alia afero estas (minuskle) internaciaj lingvoj regionaj aŭ la ekzistanta, sed absurda termino (minuskle) *internacia lingvo* en la senco ‘etna lingvo internacie uzata’.

temas pri “Esperanto, kiu estis Lingvo Internacia” (en22), ja Lingvo Internacia aperis kiel sinonimo de Esperanto. Esperanto ne estas *linguo internacia* (de3, de4). La vorto *linguo* ekzistas en la portugala kaj en Ido, ĝia signifo en ambaŭ estas ‘lingvo’.

The Encyclopaedia Britannica estis la unua, kiu en 1926 emfazis la esencan diferencon inter la vortoj *internacia* kaj *universala*. Unu post alia la enciklopedioj sekvis tiun ekzemplon, kaj nuntempe ilia plimulto ĝuste informas. Nur dek enciklopedioj restis ĉe la antaŭzamenhafa terminologio, ĉefe la hispanaj.

Ekzistas do enciklopedioj francaj, hungaraj, italaj, bulgaraj, anglaj, kroataj kaj ukrainaj, kiuj informas, ke la lingvo aperis en 1887. Pri la nomo de la lingvo akcepteblas *Lingvo Internacia* (fr1 hu11 it3), aŭ *internacia lingvo* (bg1, en21, en24, fr7, hr3, uk1), aŭ *Lingvo Internacia Esperanto* (pt1, sr1), aŭ *Esperanto* (hu9) – kvankam tiu lasta vorto nur post 1887 aperis kaj disvastiĝis kiel sinonimo de *Internacia Lingvo*. Alia ĝusta informo estas, ke Esperanto aperis kiel projekto de planlingvo (de11). Terminoj de la interlingvistiko malrapide komencis aperi ĝenerale en la enciklopedioj. Sed unu el ili jam en 1986 emfazis, ke la termino *artefarita lingvo* estas misgvida, falsa, ĉar ĝi estas termino por la formalaj lingvoj, t.e. lingvoj de la matematiko kaj logiko (hu11). Ĝis nun nur unu (faka) enciklopedio en 1993 deklaris, ke por difini Esperanton oni devas apliki la terminon *planlingvo*, anstataŭ la misgvida termino *artefarita lingvo* (de11). Per tia difino oni povus preventi multajn miskomprenojn kaj la senĉesajn (sed malfekundajn) diskutojn, kiuj abundas i.a. en la gazetaro kaj diskutforumoj. Esperantistoj povis eĉ tiun bonan eblecon misuzi: la terminon *planlingvo* oni uzas ne por la preciza difino, sed simple anstataŭ *Internacia Lingvo*.

En la enciklopedioj la atingoj, tezoj de la interlingvistiko mankas, dume svarmas la tradiciaj falsaj. En hungarlingvaj enciklopedioj anstataŭ la epiteto *internacia* oni uzas plej ofte la epiteton *helpa* aŭ *artefarita*. Por diskonigi, enkonduki ajnan ideon ne nur sufiĉas unu termino, sed devas esti nur unu, kaj nepre ne pluraj aŭ multaj. Sed fervoraj esperantistoj en la etnolingva (mis)informado pri Esperanto atingis, ke la situacio fariĝu multe pli malbona. Anstataŭ la termino *Internacia Lingvo* ili ekuzis 30–40 falsajn terminojn, kaj ili inventas pliajn. Tiel ili atingis, ke en la publika konscio la bildo pri Esperanto fariĝis malklara, konfuza, falsa kaj ne alloga.⁴²

⁴²Anstataŭ *Internacia Lingvo* oni ofte uzas: *alternativa mondlingvo*, *artefarita lingvo*, *artlingvo*, *dua lingvo por ĉiu*, *internacia helplingvo*, *helplingvo*, *neŭtrala lingvo*, *peranta lingvo*, *planita lingvo*, *pontolingvo*, *trafika lingvo*. Pli malofte: *ekumena lingvo*, *fonetika lingvo*, *ĝenerala komunikada lingvo*, *Ilo*, *interetna lingvo*, *interlingva lingvo*, *interlingvo*, *interpopola lingvo*, *komuna peranta lingvo*, *kosmopolita lingvo*, *neŭtrala peranta lingvo*, *nova ŝoso de la Hind-Eŭropaj lingvoj*, *redaktita lingvo*, *universala lingvo*, *verda lingvo*, k.t.p. Same ofte oni uzas la kombinaĵojn *lingvo de ... amikeco*, *demokratio*, *espero*,

Tiuj esperantistaj aŭtoroj, kiuj ne povas noti Dr. Zamenhof, la aŭtoron de la Unua Libro, kompreneble ne povis pludoni la bazajn konojn pri la iniciato de LMZ. Eĉ post jarcento mankas aŭ aperas kiel sensacio fidinda priskribo kaj klarigo de lia lingvoprojekto (Cherpillod 2009).

16. Estimindaj, sed ne adorindaj antaŭuloj

La enciklopediaj artikoloj nur malofte envicigas la fontojn de la artikoloj. En tiuj maloftaj kazoj plejparte oni trovas verkojn de konataj esperantistaj aŭtoroj (de11, en8, en10, en16, en24, ru1). Sed en neniu el la cititaj fontoj estas la originalaj fontoj de la falsaj datumoj – ja tiaĵoj ne ekzistas. Esperantistoj simple elpensis falsaĵojn kaj falsofaris. Kelkfoje eĉ aperis nomoj de konataj esperantistoj kiel aŭtoroj de la artikoloj (hu7, hu14, hu17). Ofte ankaŭ en aliaj artikoloj pro la stilo aŭ pro la ripetado laŭvorta oni facile povas rekoni falsaĵojn konatajn jam pli frue el la esperantlingva literaturo.

Inter la pioniroj de la falsantoj estis kaj Adam Zakrzewski, kiu en 1913, kaj Edmond Privat, kiu en sia klasika Zamenhof-biografio en 1920, sen ajna klarigo asertis, ke en 1859 li naskiĝis *Ludoviko Lazaro Zamenhof*. Aliaj kvazaŭ korektis tion al la alia falsaĵo: ne *Ludoviko Lazaro*, sed *Lazaro Ludoviko* naskiĝis. Do laŭ la falsofarantoj jam en 1859 aperis nomoj en Esperanto, kun *o*-finaĵo. Kvazaŭ ordinaraj homoj devus kredi ekziston de anĝeloj, kaj ili rajtas pridiskuti nur tion, ĉu ili havas pozitivan aŭ negativan amplekson.

La eminenta esperantologo kaj instruisto pri la rusa lingvo István Szerdahelyi rimarkigis ke la nomo *Lazaro Ludoviko* estas absurdaĵo. Li modifis tiun jam kutiman blagon al alia. Tiu estas “en 1887 esperantigita nomo, la originala nomo estis Eleazar Samenhof” (Szerdahelyi 1977:203). Tamen, Zamenhof ne *Eleazar*-on esperantigis, sed *Lazar*-on. La originalo de la Esperanta *Lazaro* estas la rusa *Lazar'*. La transskribo *Samenhof* jam dum lia vivo elmodiĝis. *Lazaro Ludoviko* estis ne la nomo, sed unu el la multaj plumnomoj de Zamenhof, kaj certe ne en 1887 aperis. Lia pseŭdonimo en 1887 estis *Dr. Esperanto* (kaj ne *D-ro Esperanto*, kiel aliaj erare asertas).⁴³ Szerdahelyi ne povis respondi al la demando, kiel Zamenhof povis ricevi “originalan rusan

humanisma internaciismo, interkompreno, internaciismo, la homaro, la laborista klaso, paco, planedismo, proleta internaciismo. Pliaj kombinaĵoj estas la samaj kun la epiteto *viva* (*viva artlingvo, viva helplingvo*, k.t.p.). Ĉio ĉi estas produkto de la esperantistaro. Kontraŭuloj de Esperanto ŝatas la malaprobajn, malgravigajn, misfamigajn, pejorativajn nomojn (*elpensita lingvo, lingvo de utopiuloj, mortinta lingvo, ne vera lingvo, ne viva lingvo, ŝtelista lingvo*, k.t.p.). La kontraŭuloj ofte faras novajn kombinaĵojn aldonante la degradigan vorteton *nur* al la konataj terminoj de esperantistoj (*nur helplingvo, nur artefarita lingvo, nur internacia helplingvo, nur neviva lingvo*, k.t.p.).

⁴³La formo *D-ro* aperas sur la lasta paĝo de la *Unua Libro*. Tamen la formo sur la titola paĝo validas.

nomon” konsistantan el du elementoj anstataŭ tri. Kiel instruisto pri la rusa lingvo li mem ekkomprenis, ke tiu frazo estas galimatia, sed tiam li ne trovis pli bonan solvon.⁴⁴

Szerdahelyi poste klopodis iel rompi la diablan cirkon. En enciklopedia artikolo enhavanta la menciitan tekston li enmetis datumon, kiu ne akordis kun la aliaj, sed estis vera: “Lazaro Ludoviko Zamenhof estas pseŭdonimo” (hu14). La unuan fojon li kuraĝis aserti tion. Samtempe li ellasis la jaron 1887, rimarkinte, ke ĝia mencio senkreditigus la tuton, ja neniuj elementoj de tiu nomo estiĝis en 1887. Depost tiu logika aserto de Szerdahelyi aliaj esperantistoj kutime tiel bagateligis la nepruveblan nom-falsofaron, ke *Ludoviko* estis nur “alprenita nomo”. Sed se tio estis alprenita nomo, ni revenis al la fundamentaj demandoj: kiu “alprenis” tiun nomon kaj kiam? Kio estis lia vera, originala nomo? Kiel eblas, ke pluraj seriozaj aŭtoroj nur halanĝas je tiu temo?

La zamenhofologo Naftali Zvi Maimon en la 214-paga verko *La kaŝita vivo de Zamenhof* grave kontribuis al la zamenhofologio per multaj utilaj detaloj pri la juda kulturo, sed aliflanke li klopodis plifortigi la malnovajn falsaĵojn kaj nebuligi la verajn problemojn.

Malgraŭ falsaj asertoj de Maimon pri la nomoj de Zamenhof, liaj aliaj kontribuoj al la zamenhofologio estis fidindaj, kontentige dokumentitaj, ekzemple pri la etna konsisto de la loĝantaro de la urbo Bjelostoko (Maimon 1978:20). Li en la sama libro resumis la pruvojn pri la judeco de Zamenhof kaj neis lian polecon. Post pliaj dek jaroj ankaŭ la akademiano Bernard Golden grave kontribuis al la malkaŝo de la falsaj asertoj pri la poleco de Zamenhof (Golden 1988:23, 1991:12–16).

Sed post la apero de mia artikolo pri Lazar Markoviĉ (Rátkai 1992) Golden kvazaŭ esprimis sentojn de tiuj esperantistoj, kiuj kvankam sciis ke la antaŭnomoj de Zamenhof certe ne estis *Lazaro Ludoviko*, tamen insistis je falsaĵoj plu. Li rezonis ke jes, la patra nomo de Zamenhof estis *Markoviĉ*, sed tio ne havas grandan signifon, ja “la rusa patronomo Markoviĉ estis trudita al li de la kutimoj en la tiama rusa imperio”.⁴⁵ Li ne neis la falsafarojn, sed provis pravigi la falsafarantojn morale.⁴⁶

La Rusa Imperio vere trudis la rusan nomformon al siaj subuloj, al judoj, tataroj, kazaĥoj, germanoj, kaj la aliaj naciaj minoritatoj eĉ per la forto de la leĝo. Sed el tio tute ne sekvas, ke esperantistoj devas prisilenti, malgravigi tiun gravan, historian fakton, eĉ en la 21-a jarcento. Kial ni hontu pri la politiko de la Rusa Imperio? Krome tio estis problemo nur por la unua-dua

⁴⁴Li mem konfesis tion al mi kiam mi demandadis lin pri tiuj detaloj. Tiutempe ankaŭ mi ne vidis solvon.

⁴⁵Letero de Bernard Golden al Árpád Rátkai 1993-11-29. OIK, Fajszigujtemény.

⁴⁶Verdire: okazis pluraj reagoj, laŭ kiuj mi “provis senhonorigi Ludovikon”, mi “ne estimas sufiĉe Ludovikon”, mi estas “perfidulo de Esperanto”, k.s.

generacioj de la asimilataj ne-rusoj. Por la novaj generacioj tio jam estis natura afero. En la kazo de la Zamenhof-familio eĉ pli, ja la patro Mark Fabianoviĉ Zamenhof memvole, konscie klopodis asimiliĝi en la rusan etnon kun sia tuta familio. Post lia morto la rusa estis la amata lingvo de lia filo Lazar kaj en lia familio, sen ajna altrudo. Alia afero estas, ke la kompletan asimiliĝon de la judoj preskaŭ tute malebligis kaj la rusa kaj la pola socio.

Lazar mortis en la jaro 1917, sed la rusan kulturon li jam transplantis ankaŭ en siajn gefilojn. Ankaŭ ili estis kaj restis rusaj judoj en la jam sendependa Pollando. Kvankam konforme al la polaj leĝoj ili perdis la duan antaŭnomon *Lazareviĉ* aŭ *Lazarovna*, ili restis rusaj judoj. Adam Lazareviĉ Zamenhof ricevis la du-elementan, polan nomon *Adam Zamenhof*. Same Sofia Lazarovna Zamenhof kaj Lidia Lazarovna Zamenhof perdis sian duan antaŭnomon. Jen “altrudo” de la polaj nomformoj, same kiel en Rusio la rusaj nomformoj. Ni scii devas pri tio, kaj ne aprobi aŭ malaprobi ilin.

Sed la bibliotekistoj en Poznań kaj en Krakovo post la morto de Lazar Markoviĉ Zamenhof forprenis de li la antaŭnomojn kaj baptis lin *Ludwik*, kvankam la polaj leĝoj ne koncernis mortintajn personojn.⁴⁷ Tiu falsofaro krome estis kontraŭ la bibliotekaj reguloj, ja la rusajn, hispanajn, k.t.p. tri-elementajn nomojn oni konservas, ne parolante pri tio, ke la katalogo nepre devus montri la referenc-nomon.

Aliflanke verŝajne ne estis kulpaj la rusaj bibliotekistoj, kiuj provis deĉifri la ĝustan nomon el la galimatioj elpensitaj de “ludovikologoj”, “ludovikistoj”, “ludvigistoj”, k.s. strangaj esperantistaj figuroj. Eble la Ljudvigoviĉ-kazo sobrigos la hodiaŭajn falsofarantojn kaj la amoko-kurado iniciatita de Javal kaj liaj kunuloj definitive finiĝos.

Laŭ la ideologiaj kaj politikaj kaŭzoj elpensitaj, diversaj falsaĵoj fortigis unu la alian. Jam en la komenco de la 20-a jarcento ili konsistis ĝisoste falsan Zamenhof-paradigmon. Dum la 20-a jarcento tiu falsa paradigmo maturiĝis al psika problemo de la tuta esperantlingva komunumo. La sin-alligo al la dogmiĝintaj falsaj datumoj estis tiel forta, ke eĉ eminentaj esploristoj ne povis aŭ ne kuraĝis konsekvence devojiĝi de la “ĉefa fluo”. Tamen, en la lastaj jardekoj en la Esperanta gazetaro plioftiĝis la artikoloj kontestantaj la falsajn asertojn. Ziko Markus Sikosek en eminenta verko traktis multajn falsofarojn, antaŭjuĝojn kaj sektecajn strangaĵojn de la movado jam tute malkaŝe (Sikosek 2003). La slogano de lia libro povus esti la zamenhofa proverbo *Eĉ el sub la tero aperas la vero*. Bedaŭrinde la titolo de la libro (*Esperanto sen mitoj*) povas sugesti, ke temas nur pri mitoj kaj neniam pri kulpoj, pri intencaj falsofaroj. Tia milda kvalifiko povas kuraĝigi fanatikul-

⁴⁷Fari tion en bibliotekaj katalogoj esence ne diferencas de la kampanjo en Bulgario, kie en la 1980-aj jaroj oni forskrapis la turkajn nomojn de sur la malnovaj tomboŝtonoj; ja temis pri la lingvo de “praa malamiko”.

ojn, kiuj ne povantaj psike akcepti la veron plilongigas la agonion de la falsa Zamenhof-paradigmo.

17. Respondeco

Negadon de amasmurdo oni nomas *Auschwitz-mensogo*, kaj ne *Auschwitz-eraro*. Falsaĵaron pri Zamenhof nomi *Zamenhof-eraro* estus ĝia prisilento, aŭ ĝia apologio. Neeviteble leviĝas la demando pri la respondeco; ja la historio de la falsaĵaro ankoraŭ ne finiĝis. Viktimoj de tiu agado estas miloj da esperantistoj, kiujn oni nutras plu per falsaj informoj, kaj kiuj pludonas ilin sensuspekte. La respondeco estas la sama, kiel kaze de falsa mono, t.e. la sensuspektaj disvastigantoj de falsaj informoj ne estas respondecaj, sed tiu, kiu sciante pri la falsafaroj pludonas falsan informon, apartenas al la kulpuloj. Longan agonion de la falsaĵaro kaŭzas tiuj diligentaj esperantistoj, kiuj klopodante trudi al Esperantio siajn antaŭjuĝojn – etnajn, naciajn, politikajn, religiajn aŭ esperantistajn – apologiadas unu aŭ alian el la jarcenta falsaĵaro.

Bibliografio

- Boulton, Marjorie (1962). *Zamenhof: Aŭtoro de Esperanto*. La Laguna.
- Cherpillod, André (2009). La genio Zamenhof kreis lingvon ne-Eŭropan, kaŝitan sub Eŭropa masko. *Esperanto*, nr. 1225, 102:5 (Majo), 103–105.
- Golden, Bernard (1988). Ĉu Zamenhof estis pola okulisto? *Paco*. Berlin: MEM-Sekcio de GDR.
- Golden, Bernard (1991). Zamenhof, Germana nomo de judo, ne polo. *Boletín de Hispana Esperanto-Federacio*, Nr. 301, maj-jun.
- Gyuris György (1967). *Katalogo de la Hungarlanda Esperanto Biblioteko*. Szeged.
- Haszpra Ottó (2000). *Eszperantó I–II*. Budapeŝto.
- Holzhaus, Adolf (1969). *Doktoro kaj lingvo Esperanto*. Helsinko: Fondumo Esperanto.
- Holzhaus, Adolf (1973). *Granda Galerio Zamenhofa*. Helsinko: Fondumo Esperanto.
- Holzhaus, Adolf (1978). *Granda Galerio Zamenhofa. 2*. Helsinko: Fondumo Esperanto.
- Hube, Walter; März, Herbert (1975). *Alfabeta katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. Parto 2*. Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo.
- Komenský, Jan Amos (Comenius, Johannes Amos) (1668). *Cesta světla ... = Via lucis ...* Prago: Státní Pedagogické Nakl., 1961.
- Korĵenkov, Aleksander (2005). *Historio de Esperanto*. Kaliningrado: Sezonoj.

- Lapenna, Ivo (1960). *Memorlibro eldonita okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof*. Londono: UEA Centro de Esploro kaj Dokumentado.
- Lapenna, Ivo; Ulrich Lins; Tazio Carlevario (1974). *Esperanto en perspektivo: Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo*. Londono; Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- ludovikito [Îto Kanzi] (1985). *Postrikolto de ludovikaĵoj*. Kioto: ludovikito.
- ludovikito [Îto Kanzi] (1987). *Unuaj libroj por esperantistoj*. 2-a eldono. Nagoya: NEC.
- Maimon, N[aftali] Z[vi] (1978). *La kaŝita vivo de Zamenhof*. Tokio: Japana Esperanto-Instituto.
- Pataki Czeller, Mária (1991). *Katalogus Fajszí Károly eszperantó gyűjteményéről*. Budapeŝto. Unua parto = *Katalogo de la Esperanto-kolektaĵo de Károly Fajszí. Libroj. Unua parto*. Budapeŝto: Országos Idegennyelvű Könyvtár.
- Privat, Edmond (1957). *Vivo de Zamenhof*. 4-a eldono. Rickmansworth: The Esperanto Publishing Co. Ltd. (1-a eldono 1920).
- Rados Péter András (1997). Egy méltatlanul elfelejtett alkotás avagy előszó Zamenhof politikai végrendeletéhez. *Tekintet*, p. 229–237.
- Rátkai, Árpád (1992). Nomoj de Lazar Markoviĉ Zamenhof. *Eventoj*, nr. 20, p. 1.
- Sikosek, Ziko Marcus (2003). *Esperanto sen mitoj*. 2-a prilaborita eldono. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo.
- Szerdahelyi István (1977). *Bábelről a világnyelvig*. Gondolat.
- Szilvási László (2004). *Eszperantó – nemzetközi nyelv*. Budapeŝto.
- Waringhien, Gaston (1948). Antaŭparolo. En: *Leteroj de L.-L. Zamenhof, I, 1901–1906*. Parizo: SAT.
- Wojtakowski, Edward T. (1979). *Decimala katalogo de la planlingva literaturo ĉe Universitata Biblioteko de la Katolika Universitato en Lublino. K.U.L., Katalog dziesiętny księgozbioru esperanckiego w Bibliotece Uniwersyteckiej K.U.L.* Romo; Lublino.
- Zakrzewski, Adam (1913). *Historio de Esperanto 1887–1912*. Varsovio.
- Zamenhof, L. L. (1929). *Originala verkaro*. Kolektitaj kaj ordigitaj de d-ro Joh. Dietterle. Lepsiko: Ferdinand Hirt & Sohn.

Konsultitaj enciklopedioj

1. bg1: B'lgarska enciklopedija. 1936.
2. cs1: Malá Československá Enciclopedie. 6. 1987.
3. de1: Meyers Grosses Konversations-Lexikon 6. 1908. (Esperanto)
4. de2: Der Grosse Brockhaus 5. 1930. (Esperanto)
5. de3: Der Grosse Brockhaus 20. 1934. (Zamenhof)
6. de4: Der Grosse Brockhaus 15. 1935.

7. de5: Brockhaus Enzyklopädie. 5. 1968. (Esperanto)
8. de6: Brockhaus Enzyklopädie. 20. 1974. (Zamenhof)
9. de7: Meyers Encyklopädisches Lexikon. 8. 1980. (Esperanto)
10. de8: Meyers Encyklopädisches Lexikon. 25. 1981. (Zamenhof)
11. de9: Das neue Osteuropa von A–Z. 2. Auflage – CH – 1993.
12. de10: Meyers Neues Lexikon. 1993. 3, 10.
13. de11: Metzler Lexikon Sprache. 1993.
14. de12: Hasenberg Kompaktlexikon 1. 1996.
15. en1: The Encyclopaedia Britannica. 9. 1910.
16. en2: The Encyclopaedia Britannica. 3. 1926.
17. en3: Encyclopedia Britannica. 22. 1947.
18. en4: The Columbia Encyclopedia in one volume. 1954.
19. en5: The Australian Encyclopaedia. 3. 1958.
20. en6: Everyman's Encyclopaedia. 5. 1958.
21. en7: Everyman's Encyclopaedia. 12. 1958.
22. en8: The Encyclopedia Americana. 5. 1961.
23. en9: The Penguin Encyclopedia. 1965.
24. en10: Chambers's Encyclopaedia. 8. 1973.
25. en11: Chambers's Encyclopaedia. 14. 1973.
26. en12: The Hasper Dictionary of Modern Thought. 1977
27. en13: The Fontana Dictionary of Modern Thought. 1980.
28. en14: The MacMillan Encyclopedia. 1981.
29. en15: The Encyclopedia Americana. Int. ed. 10. 1985.
30. en16: Academic American Encyclopedia. 1987.
31. en17: The American Heritage Illustrated Encyclopedic Dictionary. 1987.
32. en18: Chambers Biographical Dictionary. 1990.
33. en19: The New Encyclopaedia Britannica. 12. 1991.
34. en20: The Cambridge Encyclopedia. 1992.
35. en21: The World Book Encyclopedia. 6. 1993.
36. en22: An encyclopedic dictionary of language and languages. 1993.
37. en23: The Cambridge Encyclopedia of Languages. 1997.
38. en24: Chambers Biographical Dictionary. 1997.
39. eo1: Enciklopedio de Esperanto. 1934.
40. es1: Diccionario de las Americas. 1989.
41. es2: Diccionario Enciclopédico Espasa. 1. 1995.
42. es3: Diccionario Enciclopédico Espasa. 2. 1995.
43. es4: Diccionario Enciclopédico Espasa. 5. 1996.
44. es5: Diccionario Enciclopédico Espasa.11. 1997.
45. fi1: Fokusotavan kertovasti kuvitettu tietosanakirja. 1. 1965.
46. fr1: Larousse du XXe siècle en six volumes. 3. 1930. (Esperanto)
47. fr2: Larousse du XXe siècle en six volumes. 6. 1933. (Zamenhof)

48. fr3: Dictionnaire Encyclopédique Quillet. Chat-E. 1962. (Esperanto)
49. fr4: Dictionnaire Encyclopédique Quillet. Scott-Z. 1962. (Zamenhof)
50. fr5: La Grande Encyclopedie. 11. Larousse, 1974.
51. fr6: Larousse Dictionnaire en 2 volumes. 2. 1974. (Zamenhof)
52. fr7: Larousse Dictionnaire en 2 volumes. 1. 1988. (Esperanto)
53. fr8: Larousse Dictionnaire en 2 volumes. 2. 1988. (Zamenhof)
54. hr1: Opca Enciklopedija. 2. 1977.
55. hr2: Opca Enciklopedija. 8. 1982.
56. hr3: Hrvatski Leksikon. 1. 1996.
57. hu1: Révai Nagy Lexikona. 6. 1912.
58. hu2: Révai Nagy Lexikona. 19. 1926.
59. hu3: Új Magyar Lexikon. 2. 1960. (Esperanto)
60. hu4: Új Magyar Lexikon. 6. 1962. (Zamenhof)
61. hu5: Ifjúsági kislexikon. 1983.
62. hu6: Kulturális kisenciklopédia. 1986. (mesterséges nyelvek)
63. hu7: Világirodalmi lexikon. 5. 1987. (irodalom és a mesterséges nyelvek)
64. hu8: Akadémiai kislexikon. 2. 1990. (mesterséges nyelvek)
65. hu9: Akadémiai kislexikon. 2. 1990. (Zamenhof)
66. hu10: Magyar Larousse. 1. 1991. (eszperantó)
67. hu11: Cambridge enciklopédia. 1992. (eszperantó)
68. hu12: Cambridge enciklopédia. 1992. (Zamenhof)
69. hu13: Magyar Larousse 3. 1994. (Zamenhof)
70. hu14: Világirodalmi lexikon. 18. 1995. (Zamenhof)
71. hu15: Magyar katolikus lexikon. 3. 1998. (eszperantó)
72. hu16: Magyar nagylexikon. 7. 1998. (eszperantó)
73. hu17: A világ nyelvei. 1999.
74. hu18: Révai Új Lexikona. 6. 2000.
75. hu19: A világ nyelvei és nyelvcsaládjai. 2003.
76. hu20: Általános kislexikon. 1. 2005. (eszperantó)
77. hu21: Általános kislexikon. 2. 2005. (Zamenhof)
78. it1: Dictionario Enciclopedico Abreviato 3. 1957.
79. it2: Enciclopedia Europea. 4. 1977.
80. it3: Enciclopedia Zanichelli. 1992.
81. nl1: De Grote Oosthoek. Encyclopedie en woordenboek. 1981. 20.
82. pl1: Encyclopedia powszechna PWN. 1983. (Esperanto)
83. pt1: Enciclopédia Barsa. 1967.
84. ro1: Dictionario Enciclopedic Român. 1964.
85. ro2: Mic dictionar enciclopedic. 1972.
86. ru1: Bolšaja sovjetskaja enciklopedija 9. 1972. (Zamenhof)
87. ru2: Bolšaja sovjetskaja enciklopedija 30. 1978. (Esperanto)
88. ru3: Sovjetskij enciklopedičeskij slovar. 1980.

89. ru4: Bolšoj enciklopedičeskij slovar. 1987.
90. ru5: Rossijskij Enciklopedičeskij Slovar. 1. 2001.
91. sk1: Encyklopédia Slovenska. 2. 1978.
92. sr1: Mala enciklopedija perosveta. 1. 1968.
93. uk1: Ukrainiska Radjanska Enciklopedija. 5. 1960. (Zamenhof)
94. uk2: Ukrainiska Radjanska Enciklopedija. 4. 1979.
95. ru-en1: JewishEncyclopedia.com 1905/2002. www.jewishencyclopedia.com
96. ru-en2: Rossijskaya Evrejskaya Entsiklopediya; first edition. Translation of names and minimal personal data. 1995.
www.jewishgen.org/Belarus/rje_a.htm
97. ru-en3: Elektronnaja Jevrejskaja Enciklopedija. 2006.
www.eleven.co.il/

Dankoj

Mi dankas al Detlev Blanke (Berlino), Ivan Bujdosó (Budapeŝto), Nikolaj L. Gudskov (Moskvo), József Horváth (Győr), Christer Kiselman (Upsalo), Herbert Mayer (Vieno) kaj al la membroj de la redakta komitato de *Esperantologio / Esperanto Studies*, ke ili oferis tempon por tralegi mian studon kaj faris utilajn rimarkigojn, kaj aparte dankas al Ilona Böde pro ŝia multflanka helpo en la Kolektaĵo Fajszki.

Pri la aŭtoro

Árpád Rátkai, naskiĝinta en 1939, estas mezlerneja instruisto pri biologio kaj geografio; li instruis sinsekve en elementa lernejo, gimnazio, kolegio, partipolitika lernejo (historio de la laborista movado), lingvolernejo (Esperanto), altlernejo (geografio), kaj universitato (lekciisto pri Esperanto); li estis respondeculo pri minoritataj aferoj en la urbodomo de Szeged, redakciano kaj ekspertizanto pri minoritataj aferoj ĉe pluraj fondaĵoj. Tri gefiloj estas denaskaj Esperanto-lingvuloj. Li publikigis verkojn pri politikhistorio, minoritataj aferoj, la geografio kaj historio de la Esperanto-movado. Li estas aktivulo de Hungaria Esperanto-Asocio ekde 1964, i.a. prezidanto 1992–1994. Esperanton li instruas ekde 1965 kaj estas membro de UEA kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj.

Adreso de la aŭtoro

RÁTKAI Árpád <ratkai12@t-online.hu>
HU-6721 Szeged, Lengyel u. 4/B, Hungario.